

ESPERANTOLOGIO

INTERNACIA REVUO POR LA LINGVISTIKO KAJ BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Vol. I (p. 209—256)

Julio 1955

N-ro 4

Redaktata de d-ro PAUL NEERGAARD, Ak., Kopenhago, Danlando.

Redakta komitato: Profesoro, d-ro BJÖRN COLLINDER, Uppsala, Svedujo • profesoro, d-ro W. E. COLLINSON, Ak., Liverpool, Britujo • docento, d-ro KALOMANO KALOCSAY, Ak., Budapest, Hungarujo • profesoro NAOKAZU KAWASAKI, Ak., Osaka, Japanujo • profesoro S. LA COLLA, Ak., Milano, Italujo • d-ro WALTER LIPPMANN, Ak., New York, Usono • d-ro W. J. A. MANDERS, Ak., Venlo, Nederlando • profesoro, d-ro EDMOND PRIVAT, Ak., Neuchatel, Svislando • profesoro, d-ro G. JOHN RAMSTEDT, Helsinki, Finnlando • magistro VILHO SETÄLÄ, Ak., Helsinki, Finnlando • profesoro G. WARINGHIEN, Ak., Paris, Francujo • d-ro-ing. EUGEN WÜSTER, Wieselburg, Aŭstrujo.



ENHAVO

EUGEN WÜSTER: La terminoj »esperantologio« kaj »interlingvistiko«	209
C. A. TEN SELDAM: Klopodo pri starigo de sistemo de kvazaŭ-afiksoj en Esperanto	215
PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948 (III)	228
Nekrologoj: CAMILLE AYMONIER (de G. WARINGHIEN)	235
ALICE VANDERBILT MORRIS (de WILLIAM SOLZBACHER)	237
G. J. RAMSTEDT (de VILHO SETÄLÄ)	240
LEO BLAAS (de EUGEN WÜSTER)	244
Referatoj. Recenzoj: GODE & al.: Interlingua-English Dictionary, 1951 (de PAUL NEERGAARD)	245
BASTIEN: Naŭlingva etimologia leksikono, 1950 (de PAUL NEERGAARD)	247
WARINGHIEN: Plena vortaro de Esperanto. Suplemento, 1954 (de PAUL NEERGAARD)	248
Notoj (Universitataj katedroj de Esperanto III, k. a.)	251
Komuniko al la abonantoj. Communication to the subscribers	253
Indekso de temoj kaj aŭtoroj	254

EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN • DENMARK

ESPERANTOLOGIO

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto.

Adreso (abonoj, redakciaj aferoj) / Address (subscriptions, editorial matters):
D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago/Copenhagen K, Danujo/Denmark.

ESPERANTOLOGIO aperas per kajeroj 48—80-paĝaj formantaj volumojn 250—300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo probable kovranta ĉ. tri jarojn. La abonpago por unu volumo estas 25 ŝilingoj anglaj aŭ 5 us. dolaroj aŭ 25 danaj kronoj.

La revuo estas destinita por la studo de Esperanto kaj akceptas traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj el la kampo de la Esperanta lingvistiko inkludante i. a. fonetikon, leksikologion, etimologion, sintakson, stilistikon, lernopsikologion kaj bibliografion.

La respondeco pri asertoj, ĉu temas pri faktoj aŭ opinioj, restas tute ĉe ties aŭtoroj.

ESPERANTOLOGIO appears in issues of 48—80 pages, forming volumes of 250—300 pages. The issues will come out according to circumstances, one volume covering probably about 3 years. The subscription for one volume is 25 shillings, 5 dollars or 25 Danish crowns.

The journal is devoted to the study of Esperanto and accepts papers based on original research in the field of Esperanto linguistics including e. g. phonetics, lexicology, etymology, syntax, stylistics, psychology of learning and bibliography.

The responsibility for statements, whether of fact or opinion, rests entirely with the writers thereof.

INSTRUKCIOJ

por kunlaborantoj de

ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuskriptoj* proponataj por publikigo kaj komunikoj pri redakciaj aferoj estu sendataj al la redaktoro D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K, Danlando.
- 2) *Manuskriptoj* estu verkitaĵoj en Esperanto, angla, franca aŭ germana kaj tajpitaĵoj kun duobla interlinia spaco sur nur unu flanko de ne tro maldika papero, kun sufiĉe larĝa margeno ĉe la maldekstra flanko de la paĝo. Ili prefere estu sendataj duekzemplere por ŝpari tempon ĉe la prijuĝado. Kontribuaĵoj enhavanta lingvajn aŭ formalajn erarojn povas esti resendata al la aŭtoro por korektado.
- 3) Traktaĵoj jam publikigitaj en unu el la supre menciitaj lingvoj aŭ aliloke prikonsiderataj ne povas esti akceptataj.

[daŭrigota sur p. 3 de la kovrilo]

INSTRUCTIONS

for Contributors to

ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuscripts* submitted for publication and communications concerning editorial matters should be sent to the editor, Dr. Paul Neergaard, Gothersgade 158, Copenhagen K, Denmark.
- 2) Manuscripts must be written in Esperanto, English, French or German and must be typed double space on one side only of a not too thin paper, with a fairly wide margin on the lefthand side of the page. It should be sent preferably in duplicate in order to save time in judging. A paper containing language or formal errors can be returned to the author for correction.
- 3) Papers already published in one of the above mentioned languages or under consideration elsewhere cannot be accepted.

[continued on p. 3 of the cover]

- 4) Ni rekomendas, ke traktaĵo estu dividata en sekciojn, ĉiu provizata per titolo. Klareco kaj koncizo estas esencaj.
- 5) Bibliografiajn referencojn indiku per la nomo de la aŭtoro sekvata per la jaro: (MOCH 1907) aŭ MOCH (1907). La bibliografion oni metu en la fino de la artikolo aranĝatan alfabece kaj kun ĉiu indiko redaktata jene:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) Ni presigas ĉiujn ekzemplojn pri vortformoj *kursive*, kaj tiajn ekzemplojn oni bonvolu substreki en la manuskripto (ne substreku ion alian). Se la aŭtoro deziras emfazi nemultajn gravajn vortojn aŭ frazojn koncizajn, oni substreku tiujn ĉi per rompita linio, kaj ili estos presataj interspacigite. Ĉiuj personaj nomoj estas presataj per malgrandaj ĉefliteroj: MOCH, kaj povas esti tajpataj tute per ĉefliteroj: MOCH.
- 7) Oni finu la artikolon per konciza kaj klara resumo redonanta la plej gravajn punktojn de la teksto.
- 8) La aŭtoro ricevas unu, se necese du presprovaĵojn de sia artikolo. Korektoelspezoj, kiuj superas 10 % de la kosto de la kompostado, devas esti pagataj de la aŭtoro.
- 9) La redaktoro bedaŭras ne povi honorarii artikolojn akceptitajn.
- 10) *Represaĵoj*. Ĉiu kontribuinto ricevas 2 ekzemplerojn de la kajero enhavanta lian artikolon. Senkostaĵaj represaĵoj ne estas je dispono. Tarifo estas ĉemetata al la presprovaĵo kaj la aŭtoroj povas mendi represaĵojn plenigante kaj resendante ordonan formularon.

- 4) It is recommended that papers be divided into sections, each headed by a caption. Clearness and conciseness are essential.
- 5) Text references should be made using author's name followed by the year: (MOCH 1907) or MOCH (1907). The bibliography should be placed at the end of the article and arranged in alphabetical order. Each item should be set out as follows:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) We print all examples of word-forms with *italics*, and such examples should be underlined in the manuscript (do not underline anything else). If the author wants to emphasize a few important words or short sentences these should be underlined with a broken line and will be printed with spaced type. All personal names are printed with small capitals: MOCH, and may be typed entirely with capitals: MOCH.
- 7) The article should conclude with a short, clear summary reviewing the important points in the text.
- 8) The author receives one, if necessary two proofs of his article. Correction costs which exceed 10 % of the type-setting costs must be paid by the author.
- 9) The editor regrets not to be able to pay any fee for articles submitted.
- 10) *Offprints*. Each contributor will receive 2 copies of the issue in which his article is published. No gratis offprints will be supplied. A printed schedule of prices is submitted with the proof and authors may secure offprints by placing an order on the blanks provided when proof is returned.

ESPERANTOLOGIO
VOLUMO I

ESPERANTOLOGIO

INTERNACIA REVUO POR LA LINGVISTIKO KAJ BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Redaktata de d-ro PAUL NEERGAARD, Ak., Kopenhago, Danlando.

Redakta komitato: Profesoro, d-ro BJÖRN COLLINDER, Uppsala, Svedujo • profesoro, d-ro W. E. COLLINSON, Ak., Liverpool, Britujo • docento, d-ro KALOMANO KALOCSAY, Ak., Budapest, Hungarujo • profesoro NAOKAZU KAWASAKI, Ak., Osaka, Japanujo • profesoro S. LA COLLA, Ak., Milano, Italujo • d-ro WALTER LIPPMANN, Ak., New York, Usono • d-ro W. J. A. MANDERS, Ak., Venlo, Nederlando • profesoro, d-ro EDMOND PRIVAT, Ak., Neuchatel, Svislando • profesoro, d-ro G. JOHN RAMSTEDT, Helsinki, Finnlando • magistro VILHO SETÄLÄ, Ak., Helsinki, Finnlando • profesoro G. WARINGHIEN, Ak., Paris, Francujo • d-ro-ing. EUGEN WÜSTER, Wieselburg, Aŭstrujo.

VOLUMO I

1949—1955



EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN • DENMARK

Enhavo

PAUL NEERGAARD: Enkonduko	1
PAUL NEERGAARD: Introduction	3
VILHO SETÄLÄ: Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vort- trezoro	5
G. WARINGHIEN: La akuzativo en Esperanto, el teoria kaj inter- lingvistika vidpunkto	33
OLAV REIERSØL and R. C. MARBLE: A Comparison between Word Formation in Esperanto and English	53
J. RÉGULO PÉREZ: Hispanidaj neologismoj en Esperanto	59
PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948 (I)	73
W. E. COLLINSON: The Internationality of some Esperanto Af- fixes	81
N. KAWASAKI: Esperantigaj principoj de japanaj vortoj	89
F. I. WIENER: Gemelaj radikoj	98
LEO BLAAS: Statistiko de 50.000 tekstvortoj	107
PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948 (II)	133
F. I. WIENER: Sajnprefiksoj	145
CECIL BEAN: Pri la ritmoj en Esperanto	152
LEO BLAAS: Statistiko de 50.000 teksvortoj (daŭrigita)	160
VILHO SETÄLÄ: La Zamenhofa Hamlet-traduko	201
Koncizaj Komunikoj:	
W. E. COLLINSON: Noto pri la artikolo »The Internationality of some Esperanto Affixes«	205
MAREK WAJSBLUM: Internacieco de kelkaj Esperantaj afiksoj	205
PAUL NEERGAARD: Neatentitaj Zamenhofaj tekstoj	206
EUGEN WÜSTER: La terminoj »esperantologio« kaj »interling- vistiko«	209
C. A. TEN SELDAM: Klopodo pri starigo de sistemo de kvazaŭ- afiksoj en Esperanto	215
PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—48 (III)	228
Nekrologoj:	
G. WARINGHIEN: Camille Aymonier	235
WILLIAM SOLZBACHER: Alice Vanderbilt Morris	237
VILHO SETÄLÄ: G. J. Ramstedt	240
EUGEN WÜSTER: Leo Blaas	244

Referatoj. Recenzoj:

MANDERS: Interlingvistiko kaj esperantologio, 1950 (PAUL NEERGAARD)	137
GODE & al.: Interlingua-English Dictionary, 1951 (PAUL NEERGAARD)	245
BASTIEN: Naŭlingva etimologia leksikono, 1950 (PAUL NEERGAARD)	247
WARINGHIEN: Plena vortaro de Esperanto. Suplemento, 1954 (PAUL NEERGAARD)	248

Notoj:

Universitataj katedroj de Esperanto I	77
Universitataj katedroj de Esperanto II	142
Universitataj katedroj de Esperanto III	251
Universitataj Esp-o-kursoj ekster la katedroj	79, 252
La vinjeto sur la kovrilo	80
Landnomoj	80
Harry Mylén	143
Ricevitaj publikigaĵoj	143
Komuniko al la abonantoj. Communication to the subscribers	253
Indekso	254

La terminoj »esperantologio« kaj »interlingvistiko«

de D-ro EUGEN WÜSTER

La redaktoro demandis la aŭtoron, kiun signifon li aljuĝas al la terminoj »esperantologio« (kiun li enkondukis) kaj »interlingvistiko«. Jen la ĉefa parto de la responda letero.

Mia opinio

Esperantologio. Mi enkondukis la terminon »esperantologio« en artikolo aperinta en 1921 en la revuo »*Esperanto Triumfonta*« (la pli posta »*Heroldo*«), n-roj 41 (17. 7.) kaj 42 (24. 7.). La artikolo havas la nomon »*Esperantologio kaj Esperantologoj*«.

En tiu artikolo mi diris, ke la »esperantologio« estas tiu branĉo de la »sinteza lingvistiko«, kiu estas aplikata »al la jam multe uzata sistemo Esperanto«. Mi celis nek pli nek malpli ol, laŭ la difino de NEERGAARD (»*La Esperantologio . . .*«, 1942), »la lingvistikon de Esperanto«.

Sinteza lingvistiko. En la dirita artikolo mi nomis »sinteza lingvistiko« tiun relative novan branĉon de la lingvistiko, kiu ne nur konstatas, sed kiu konscie influas (gvidas) la evoluon de lingvo. La sinteza lingvistiko pli kaj pli aplikiĝas ankaŭ al la naciaj lingvoj, paralele kun la tradicia, sole konstata lingvistiko. En mia ampleksa libro »*Internationale Sprachnormung in der Technik*«, kiun en 1931 eldonis VDI-Verlag, mi kolektis abundan materialon el 29 lingvo-teritorioj pri tiu fakto¹⁾. Ĝuste tial pri mia libro detale raportis en la lingvistaj revuoj aŭtoritatuloj kiel BRANDL, DEBRUNNER, MEILLET, MESSING, SCHMIDT, STECHE, WEISGERBER.

Konsekvenco de mia libro estis, ke en 1936 la Internacia Federacio de la Naciaj Asocioj de Normigo (ISA) instalas Teknikan

¹⁾ En la fino de 1953 mi liveris al UNESCO la manuskripton de »*Bibliography of Standardized Monolingual Glossaries*« (Bibliografio de Unulingvaj *Normigitaj* Vortaroj). Tiu bibliografio baldaŭ aperos. En ĝi estas registritaj 1581 terminologiaj eldonaĵoj el 36 landoj.

Komitaton »Terminologio«. En la lastaj du jardekoj la sinteza lingvistiko faris gravajn progresojn en pluraj landoj. Ankaŭ en la konata raporto de UNESCO pri la sciencaj vortaroj la materialo de mi kolektita estas plurloke utiligita.

Alia moderna nomo (inter aliaj) por »sinteza lingvistiko« estas »Language Planning«. HOGBEN, la aŭtoro de la rimarkinda libro »The Loom of Language« (London 1944) uzas tiun terminon en la titolo de du el la konkludaj artikoloj de sia libro.

I n t e r l i n g v i s t i k o. Kiu enkondukis la terminon »interlingvistiko«, mi ne scias. Certe ĝi estas multe pli nova ol la sistemonomo »Interlingua« de PEANO (1909). La difino de JESPERSEN (1929) estas: »Tiu branĉo de la lingvoscienco, kiu okupiĝas pri la strukturo kaj bazaj ideoj de ĉiuj lingvoj, celante establi normon por interlingvoj, t. e. helplingvoj . . .«.

Se la sinteza lingvistiko rilate al la naciaj lingvoj estas nur branĉo malgranda kaj tute freŝa de la lingvistiko, — la lingvistiko de la artefaritaj lingvoj tuta apartenas al la sinteza lingvistiko.

P l a n l i n g v o. Ankaŭ tiu termino, kiun WARINGHIEN atribuas al MANDERS (»Sennaciulo«, dec. 1950, p. 6), estas enkondukita de mi.

Unuafoje mi uzis ĝin (en la germana formo »Plansprache«) en mia libro »Internationale Sprachnormung« (1931). Mi volis krei pli oportunan ekvivalenton de la termino »constructed language«, kiun enkondukis JESPERSEN en sia libro pri Novial kaj kiun d-ro AUERBACH, la germana tradukinto de tiu libro (»Eine Internationale Sprache«, 1928), redonis per »konstruierte Sprache«.

Laŭ mia intenco »planlingvo« estas sinonimo de »interlingvo« en ties hodiaŭa, pli vasta signifo. Kiam mi enkondukis la vorton »planlingvo«, la termino »interlingvo« ŝajnis ankoraŭ rezervita al la sistemo de PEANO²⁾. Bedaŭrinda refalo en tiun staton estas, se freŝdate du aliaj sistemoj uzurpas la nomon »interlingvo«, nome la sistemoj de VON WAHL (»Interlingue«) kaj de IALA (»Interlingua«).

²⁾ Kvankam PEANO mem kaj la »Academia de Interlingua«, kiu de 1909 havis sian sidejon en Torino ĉe PEANO, uzadis la vorton »interlingua« en la ĝenerala senco, t. e. ne sole por speciala sistemo.

Cetere la vorto »interlingvo« ne taŭgas por uzo en tiaj lingvoj, kiuj simile al la germana lingvo ne posedas la latindevenan radikon »lingvo«. Ĉar la angla lingvo, ekzemple, posedas la latindevenan vorton »language«, oni facile povis derivi de ĝi per la same latindevena prefikso »inter-« la vorton »interlanguage«. En la germanan lingvon, kontraŭe, oni povus sole traduki ĝin laŭvorte, t. e. per »Zwischensprache«. Sed tia tradukaĵo apenaŭ havus ŝancon, esti akceptata, ĉar mankas analogiaj vortoj kun la prefikso »Zwischen-«.

Diverĝaj opinioj

Esperantologio. Jam baldaŭ post enkonduko de la termino »esperantologio« mi rimarkis, ke kelkaj personoj aljuĝas al ĝi pli malvastan signifon. KALOCSAY en la Enciklopedio de Esperanto, unua parto (1933), formulis tiun interpreton jene: »Esperantologio. Tiel oni nomas, laŭ WÜSTER, la specialan E-an lingvistikon, okupiĝantan pri vortkonstruo, vortkunmeto, vort-enkonduko, transskribo de int. fakvortoj kaj de propraj nomoj.«

Estas vere, ke tiu difino povus esti dusenca laŭ tio, ĉu la frazoparton komenciĝantan per la vorto »okupiĝantan« oni komprenas kiel juĝon »analizan« aŭ »sintezan« (por uzi terminojn el la logiko). Alivorte, ĉu, tradukante la frazon en la francan lingvon, oni devus traduki la vorton »okupiĝantan« per relativa pronomo kun aŭ sen antaŭiranta komo. Sed el la ekzemploj donitaj de KALOCSAY en la Enciklopedio oni povas konkludi, ke efektive ankaŭ li volas diri, ke al la esperantologio apartenas *sole* tiuj branĉoj de la esperanta lingvistiko, kiujn li citas eksplicite. Tio estas tiom pli verŝajna, ke KALOCSAY ŝajne ne konis mian artikolon de 1921. Ĉar sub la »Literaturo« pri »Esperantologio« li citas sole mian studon »Esperantologiaj principoj« (1923).

En alia maniero MANDERS malvastigas la signifon, kiun mi volis doni al la vorto »esperantologio«. En sia libro »Interlingvistiko kaj Esperantologio« (1950) li skribas: »Kontraste kun la interlingvistiko, kiu havas kreon celon, ĝi estas scienco konstata kaj pri-skriba.«

Tion mi ne konsideras kiel akcepteblan. Estas nur diferenco grada inter la kreado de tuta lingvosistemo kaj la sistematika

kreado de apartaj vortelementoj, kombinaĵoj kaj principoj. La esenco komuna estas la *konscia*, organizita evoluigo. Kaj super tio, eĉ la plej konservativaj esperantologoj ne okupas sin nur pri la evoluo de »vivanta lingvo«, sed ili studas ankaŭ la volo-agojn, per kiuj eknaskiĝis la sistemo. Kaj tiaj volo-agoj estas la karakterizaĵo tiel de la »sinteza lingvistiko« ĝenerale, kiel de la »interlingvistiko« speciale.

I n t e r l i n g v i s t i k o. Se MANDERS opinias, ke la interlingvistiko ne inkludas la esperantologion, ŝajne li konkludas tion ne nur el sia malvastiga interpreto de la termino »esperantologio« (ke ĝi estas nur konstata), sed ankaŭ el aldona malvastigo de la signifo de la termino »interlingvistiko«. Ĉar li diras, ke »laŭ la strikta difino de JESPERSEN nek SCHLEYER nek ZAMENHOF estis interlingvisto.«

Eĉ se oni asertas, ke la esperantologoj sole konstatas, oni tamen ne povas nei, ke SCHLEYER kaj ZAMENHOF kreis. Kaj por fari tion, ili studis multajn naciajn lingvojn. Tial ili estis interlingvistoj. Sed ŝajnas, ke MANDERS interpretas la difinon de JESPERSEN tiel, ke sole specialisto de la kompara kaj ĝenerala lingvistikoj povas esti interlingvisto.

Laŭ mia opinio, bazita ankaŭ sur la maniero, en kiu IALA aplikis la vorton »interlingvisto« en la tempo de JESPERSEN, la malvasta interpreto de MANDERS ne estas konforma al la intenco de JESPERSEN. Oni eble devus diri, ke SCHLEYER kaj ZAMENHOF ne estis modernaj interlingvistoj. Inverse mi opinias, ke eĉ kontraŭulo de Esperanto povus esti bonega esperantologo.

Alian malvastigon de la signifo de la termino »interlingvistiko« oni trovas en la jam menciita recenzo de WARINGHIEN. Li diras pri la interlingvistiko: »Se tiu estas scienco, ĝi povas havi kiel objekton nur la priskribon, analizon kaj komparadon de la ekzistantaj planlingvoj, neniel la eltrovon de »plej kontentiga solvo de la planlingva problemo«.« Estas vere, ke ankoraŭ antaŭ kelke da jardekoj la frakasa plimulto de la lingvistoj havis tiun opinion; sed intertempe multaj reviziis ĝin. Eĉ koncerne la naciajn lingvojn ĝi ne plu estas trafa, kiel mi provis montri supre sub »sinteza lingvistiko«.

Se oni forlasas, kiel faris WARINGHIEN, la terenon de la lingvi-

stiko, tiam lia aserto ne estas ĝusta eĉ rilate al jarcentoj de longe pasintaj. Ĉar »sciencon« oni ne povas difini alie ol kiel »sistematan ordon de scioj«, kaj la progresoj de la natursciencoj ebligas antaŭdiri kaj eĉ formi la materian estontecon.

WARINGHIEN diras: »La studentoj de la mekanika scienco ne celas eltrovi la plej kontentigan formon de aŭtomobilo Scienco klarigas; krei estas la privilegio de la tekniko aŭ de la arto.« Tia divido estas abstrakta, sed ne reala. Mi mem studis la mekanikan sciencon kaj la elektroteorion, por konstrui objektojn similajn al aŭtomobilo. Kaj la plejparto de la aliaj sciencistoj en tiuj fakoj faras simile. Sufiĉas rigardi la plej aŭtoritatajn lernolibrojn de la diritaj sciencoj por vidi, ke ne ekzistas interlimoj. Oni memoru, ke la teorie plej fruktodona fizikisto de nia epoko estis inĝeniero, kiu studis ĉe politeknika lernejo: ALBERT EINSTEIN. Kiam li starigis la specialan principon de relativeco por la tuta fiziko (en 1905), lia profesio estis (de 1902 ĝis 1909), ekzameni patentojn.

Zusammenfassung

Der Schriftleiter hat den Verfasser gefragt, welche Bedeutung er dem vom ihm eingeführten Ausdruck »Esperantologie« zuschreibt, insbesondere im Verhältnis zu dem Ausdruck »Interlinguistik«. Dieser Aufsatz, eigentlich ein Brief, enthält die Antwort:

Meine Meinung. Als ich den Ausdruck »esperantologio« im Jahr 1921 einführte, gab ich ihm die allgemeine Bedeutung »Sprachwissenschaft des Esperanto«, im Gegensatz zur »Esperanto-Bewegung«. Ich ordnete die Esperantologie damals als einen Zweig der »gestaltenden Sprachwissenschaft« (oder »Sprachplanung«) ein, die als jüngere Schwester an die Seite der klassischen, nur »betrachtenden Sprachwissenschaft« tritt. Sie beschäftigt sich auch mit den Volkssprachen, besonders mit der Fachsprache (siehe mein Buch »Internationale Sprachnormung«, 1931).

Die »Interlinguistik« verhält sich zu der »Esperantologie« wie die Sprachwissenschaft schlechthin zur Romanistik oder Germanistik. Verwendet man den im Jahr 1931 von mir eingeführten Ausdruck »Plansprache« an Stelle von »Kunstsprache«, dann kann man die Interlinguistik auch »Plansprachenwissenschaft« nennen.

Abweichende Meinungen. Manche Personen haben den Ausdruck »Esperantologie« in engerer Bedeutung verwendet: KALOCSAY beschränkt ihn auf Wortbau und Worтеinführung. MANDERS erklärt die Esperantologie als nur betrachtend, die Interlinguistik aber im

Gegensatz dazu als gestaltend. WARINGHIEN dagegen lässt eine Wissenschaft »Interlinguistik« überhaupt nur dann gelten, wenn sie nur betrachtend ist.

Alle diese Einschränkungen der Ausdrücke »Esperantologie« und »Interlinguistik« scheinen mir willkürlich und unzweckmässig.

BIBLIOGRAFIO

- BODMER, FREDERICK kaj HOGBEN, LANCELOT, 1946: The loom of language, 4a eldono. London. 669 p. (Unua eldono: 1944.)
- GODE, ALEXANDER, 1951: Interlingua-English, a dictionary prepared by the research staff of the IALA. New York. LXIV + 415 p.
- JESPERSEN, OTTO, 1928: An international language. London.
- 1928: Eine internationale Sprache. Heidelberg. 148 p.
- 1930: A new science: Interlinguistics. Report of meeting of Linguistic Research, Geneva, 1930. Cambridge. 11 p.
- KALOCSAY, K., 1933: Esperantologio. — Enciklopedio de Esp-o 1: 125.
- KANDLER, G., 1952/53: Angewandte Sprachwissenschaft. — Wirkendes Wort n-ro 5 p. 257—271.
- 1954: Zur Erneuerung der Sprachpflege durch die »angewandte Sprachwissenschaft«. — Muttersprache n-ro 7—8 p. 260—271.
- MANDERS, W. J. A., [1950]: Interlingvistiko kaj esperantologio. Purmerend [Nederlando]. 77 p.
- NEERGAARD, PAUL, 1942: La esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. — [libro] Tra densa mallumo: 37—64. Kopenhago.
- PEANO, G., 1909: Vocabulario Commune. Torino. 87 p.
- 1915: Vocabulario Commune. Editione II. Cavour-Torino. 639 p.
- WARINGHIEN, G., 1950: Dro. W. Manders, Interlingvistiko kaj Esperantologio. [recenzo]. — Sennaciulo 21 (n-ro 12): 6.
- WÜSTER, EUGEN, 1921: Esperantologio kaj Esperantologoj. — Esperanto Triumfonta n-roj 41 (17.7.) kaj 42 (24. 7.).
- 1923: Esperantologiaj principoj. — Enciklopedia vortaro Esperanto-germana . . : (25)—(66).
- 1931: Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik. Berlin. 431 p.
- 1936: Konturoj de la Lingvonormigo en la Tekniko. El la germana originalo esperantigis D-ro Emil Pfeffer. Budapest. 123 p.

Klopodo pri starigo de sistemo de kvazaŭ-afiksoj en Esperanto

de D-ro C. A. TEN SELDAM

En la radikoj de nia lingvo ofte troviĝas certaj vorteroj, kiuj similas (kaj en la originala lingvo estis) afiksoj, afiksiĝintaj prepozicioj ktp. Ekzemple la vorteroj *ko-*, *kom-*, *kon-* estas tiaj kvazaŭ-afiksoj; ilia signifo ofte estas *kun-*; sed ankaŭ ofte la rilato inter *ko-* ktp. kaj *kun-* estas tre malpreciza aŭ eĉ nur etimologia: kia estas la rilato inter ekz. *kompreni* kaj *kun-preni*? Rilate tion la kvazaŭ-afiksoj do grave diferencas de la regulaj afiksoj (vidu DELLIAN 1948, ALBON 1949).

Plue, kiam mi diras ke ekz. la vortoj *kuri*, *konkuri*, *konkurenco*, *ekskurso*, *kursiva* interrilitas, ĉar konsistas el formoj (jes aŭ ne esperantaj) de la verbo *kuri* kaj afiksoj *eks-*, *kon-*, *-nco*, *-iva* ktp., oni tuj komprenos ke tie ĉi temas pri vortfarado tute alispeca ol la zamenhofa, eĉ tiu vortfarado kian ni opinias kritikinda en Interlingue (la iama Occidental; vidu GILBERT 1950).

Tamen, se ni uzus tian interlingue-ecan sistemon de bone elektitaj afiksoj apud niaj regulaj zamenhofaj, por (se eĉ nur etimologie) analizi tiujn vortojn (precipe la antikvalingvidajn) kiujn la lasta sistemo ne plu povas analizi, tiukaze tiaj kvazaŭ-afiksoj povus doni nur profiton (Ne nur por Esperanto, sed eĉ por naciaj lingvoj oni povus fari tian interlingue-ecan sistemon). Kiel la afiksaro de Interlingue (kvankam miaopinie malsupera al nia regula), tiel, mi kredas, ankaŭ tia kvazaŭ-afiksaro plifaciligus la vortlernadon kompare kun la plena manko-de-sistemo en naciaj lingvoj kaj la ekstreme naturalismaj IALA-variantoj (vidu MANDERS 1950).

Malgraŭ ĉio tio la kvazaŭ-afiksoj ŝajnas al mi utilaj ne tiom por la ĝenerala lernanto de Esperanto kiom en la scienca lingvo, kie ja jam multaj tiaj antikvalingvidaj vortoj uziĝas. Mi ne volas daŭrigi ne donante kelkajn avertojn:

1) oni ĉiam klare diferencigu inter la zamenhofa kaj kia ajn kvazaŭa afikssistemoj, por ke la lasta neniel fuŝu la laŭ-analogian vortfaradon pere de la unua; 2) oni uzu la kvazaŭ-afiksaron unuloke kiel vort-analizilon, ne por amasa kreado de neologismoj. Oni unue esploru ĉu vorto kunmetita el jam ekzistantaj radikoj kaj/aŭ regulaj afiksoj ne povas kontentige esprimi la vortigendan nocion (vidu NEERGAARD 1933).

La nombroj inter [] proksimume indikas kiomfoje la koncernaj kvazaŭ-afiksoj troviĝas en la uzita de mi ĝenerallingva vortaro (DE VEER 1936. Ĝi enhavas ĉiujn radikojn en la Fundamento kaj la tri unuaj Aldonoj, krome multajn radikojn tiam ankoraŭ ne oficialigitajn, kiuj »troviĝas en verkoj de Zamenhof, Bein, Privat, Bourlet kaj multaj aliaj bonaj verkistoj esperantaj«, entute 6000—6500 radikojn). Tiuj nombroj do formas proksimuman mezuron de la graveco de tiuj kvazaŭ-afiksoj. Rilate kelkajn maloftajn kvazaŭafiksojn tamen ne nur tiuj nombroj gvidis min je mia elekto, kaj tie do dubo pri la pleja oportuneco de mia elekto eblas.

Faklingvoj ofte posedas jam proprajn sistemojn de afiksoj specialsignifaj; mi menciis nur la kemion kun ĝiaj multaj materialnomoj finiĝantaj per *-ato*, *-ido*, *-ano*, *-eno* ktp.

Mallongigoj. DWR = DE-WAHL-radiko (§ D); F = franca; G = grek(id)a; Il = Interlingue; KA = kvazaŭ-afikso; KET = kvazaŭ-estanteco-trunko (§ E); KP = kvazaŭ-prefikso; KPT = kvazaŭ-perfekto-trunko (§ D); KR = kvazaŭ-radiko; KS = kvazaŭ-sufikso; L = latin(id)a; ril. = »rilatas al«, indiko de la jen klara, jen preskaŭ neperceptebla rilato inter la KA kaj la donita »signifo«; V = vokalo; ZR = ZAMENHOF-radiko (§ D); * = la koncerna KP ofte perdas sian finan vokalon antaŭ vokaloj; / disigas variantojn de unu KA.

A.) Kelkaj tre oftaj kvazaŭprefiksoj. Rilate kelkajn el ili komparu ankaŭ WIENER 1951.

1) [155] (L) *kon-*, *kom-* (antaŭ *b*, *f*, *p*), *ko-* (antaŭ V-oj, *gn*, *h*, *l*, *m*, *n*, *r*, *s*, *t*, *v*, *z*) ril.: kun-, kune.

2) [80] (L) *ad-*, *ak-* (antaŭ *c*), *a-* (antaŭ *d*, *f*, *g*, *k*, *l*, *n*, *p*, *r*, *s*, *t*, *v*,) ril.: -al, kun-, ĉe-.

- 3) [75] (L) *re-/ri-* kiel KP ril.: la regula »re-«.
- 4) [80] (L) *in-, im-* (antaŭ *b, f, p*), *i-* (antaŭ *gn, l, m, n, r*) ril.: a): ne-, mal-; b): en-, sur-, al-.
- 4a) [9] (G) *en-, em-* (antaŭ *b, f, p*), *e-* (antaŭ *l, m, n, r*) ril.: en-, sur-, ĉe-.
- 5) [60] (L) *eks/es-, e-* (antaŭ *d, f, l, m, n?, r, s?, t, v*) ril.: el-, do ne samsignifas la regulan »eks-«.
- 6) [60] (L, G) *pro-* ril.: por-, antaŭ(en)-, do estas iom alisignifa ol la prepozicio »pro-«.
- 7) [50] (L) *de-/di-* kiel KP ril.: ek de, for de, mal-.
- 7a) [10] (L) *dis-, di-* (antaŭ *f, s, v*) kiel KP ril.: dis-, ne-, mal-.
- 8) [20] (L) *ob-, ok-* (antaŭ *c*), *o-* (antaŭ *b, f, k, p*) ril.: kontraŭ-.
- 9) [20] (L) *pre-* ril.: pra-, antaŭ- (tempe kaj loke).

B.) Multaj malpli gravaj kvaŝaŭprefiksoj. Por definitiva listo oni eventuale devus elekti inter la vorteroj sub B (kaj samtiel ankaŭ sub F kaj I).

- 10) [15] (G) *a-, an-* (antaŭ V-oj) ril.: sen-, ne-, mal-.
- 11) [16] (L) *ab-, abs-* (antaŭ *c*), *am-* (antaŭ *b, p*) ril.: disiĝo (pri du aŭ pliaj aĵoj antaŭe konektitaj), la germana *ab-*.
- 12) [4] (G) *amfi-** ril.: ambaŭflanke de.
- 13) [12] (G) *ana-** ril.: supren-.
- 14) [12] (G) *anti-** ril.: kontraŭ-.
- 15) [10] (G) *apo-*/af-* ril.: ek de, for de.
- 16) [13] (G) *arke-*/arki-** ril.: komenco, regado.
- 17) [9] (G) *aŭto-** ril.: mem-.
- 18) [13] (G) *dia-** ril.: tra-.
- 19) [13] (G) *epi-*/ef-* ril.: sur-, super-, al-.
- 20) [4] (G) *eŭ-/ev-* ril.: bon-.
- 21) [2] (G) *hiper-* ril.: plej, tre.
- 22) [8] (G) *hipo-*/hif-* ril.: sub-, malpli-. (*Hipo-* signifas ankaŭ »ĉeval-«).
- 23) [3] (G) *hom(e)o-** ril.: sam-.
- 24) [4] (L) *inter-* / (F) *entre-* ril.: la regula »inter-«.
- 25) [8] (G) *kata-** ril.: malsupren- (mal-ana-), -eg-, kontraŭ-.
- 26) [8] (L) *kontr(a)-* ril.: kontraŭ-.
- 27) [5] (G) *meta-** ril.: malantaŭ(e), ali-state, aliloke.

- 28) [4] (G) *panto*-* / *pan*-, *pa*- (antaŭ *l, m, n*), *pam*- (antaŭ *b, f, p*) ril.: tut-.
- 29) [18] (G) *para*-* ril.: de-, laŭlonge de, mis-.
- 30) [12] (L) *per*-, ril.: per-, tut-.
- 31) [3] (G) *peri*- ril.: ĉirkaŭ-, proksime al.
- 32) [8] (G) *poli*- ril.: mult-.
- 33) [3] (G) *proto*-* ril.: unue, unua.
- 34) [17] (G) *sin*-, *sim*- (antaŭ *b, f, p*), *si*- (antaŭ *l, m, n, r, s, z*) ril.: kun-.
- 35) [18] (L) *sub*-, *suk*-, (antaŭ *c*), *su*- (antaŭ *b, f, g, k, p, r, s*) ril.: la regula »sub«.
- 36) [9] (L) *super*- / (F) *sur*- ambaŭ ril.: la prepozicioj »super«, »sur«.
- 37) [5] (G) *tele*- ril.: malproksime(n)-.
- 38) [11] (L) *tra*-, *trans*- ambaŭ ril.: la prepozicioj »tra«, »trans«.

C.) 39) [proks. 500] *La kvazaŭsufiksio kaj kelkaj el ĝiaj »idoj«*. Ĉe tiu ĉi treege ofta kvazaŭsufikso plia dividado eblas. Kvazaŭsufiksojn kiuj rilatas al kelkaj »idoj« mi ankaŭ mencias ĉi-sube.

a) Aĵoj, aferoj. (*medio, poezio, stipendio*). Gravaj subgrupoj:

40) *-io* post KPT-oj ril.: rezulto de agado. Vidu § D.

41) *-ario* ril.: io kio rilatas al la KR (*akvario*). Vidu ankaŭ 52.

41a) (L) *-ara* (Il *-ari*), adjektivo kiu rilatas al la KR, do ne simila al la regula *-ar*- (*kapilara, ordinara*).

b) eco, stato, malsano (*demagogio, anemio*). Gravaj subgrupoj:

42) *-io* post KPT-oj ril.: agado. Vidu § D.

43) [7] (G) *-kratio* ril.: regadsistemo, regantaro. La reganto aŭ regadsistem-ano estas *-krato* (*demokratio/-krato*).

44) [8] (G) *-patio, pat*- ril.: sento, malsano (*apatio, patologio*).

c) plantoj kaj bestoj (*cikonio, geranio*).

d) landnomoj. Ekster la *-ujo/-io* problemo ekzistas jam multaj landnomoj finiĝantaj per *-io*. Kelkfoje la sama nomo finiĝanta per nura *-o* indikas urbon: *Meksiko/Meksikio*. Inter la landnomoj:

45) [5] (G) *-nezio* ril.: -insul(ar)o (*Polinezio*).

e) Sciencoj, vivkampoj. Inter ili:

46) [30] (G) *-metrio* ril.: scienco pri mezuriloj (= *-metroj*) aŭ pri mezuroj kaj iliaj rilatoj. Krome ekzistas la longec-unuo *metro*.
 47) [70] (G) *-logio* ril.: scienco. Ĝi estas tre ĝenerale KS por tio, kune kun *-iko*. La fakulo estas *-log(iist)o*. Krome *-log-* ril.: vorto, en kunmetitaĵoj kun grekidadaj KA-oj.

48) [11] (G) *-nomio* (<G *nomos* = leĝo) ril.: scienco. Kelkfoje uzata por diferencigi de samtema *-logio* (*astrologio/-nomio*). La fakulo estas *-nom(iist)o*. Pro la similformeco mi tuj tie ĉi mencias:

48a) [10] (G) *-onim-*, (L) *-nom(in)-* ril.: nomo.

49) [3] (G) *-urgio* (<G *ergon* = laboro) ril.: scienco, laborado (*kirurgio*). La fakulo estas *-urg(iist)o*.

Pro koncizo kaj simpleco estus pli oportune se oni ĉiam uzus *-logo*, *-nomo*, *-urgo*, *-zofo* (vidu 51) por la fakuloj.

50) [45] (G) *-grafio* ril.: a) scienco priskriba (*geografio*); la fakulo de tia scienco estas *-graf(iist)o*; b) : scienco, metio k. s. kiu rilatas al skribado, desegnado. Tiam *-grafo* R skribanta aŭ desegnanta persono aŭ aĵo (*telegrafo*), aŭ (apud *-gramo*) rezulto de skribado/deseĝnado. *Gramo* ankaŭ estas pez-unuo.

51) [4] (G) *-zofio* ril.: scienco, idearo pri iu vivregiono (*teozofio*). La fakulo estas *-zof(iist)o*.

f) materialoj (*aluminio, sepio*).

g) personoj (*harpio, patricio*). Inter ili:

52) *-ario* ril.: iu kiu rilatas al la KR (*notario*). (Vidu ankaŭ 41, 41a). $41 + 41a + 52 = [40]$.

h) lokoj, institutoj (*akademio, podio*). Inter ili:

53) *-orio* post KPT-oj ril.: ejo. Vidu § D.

Rimarko: Antaŭ la konsonant-komencaj KS-oj oni ofte intermetas vokalon, plejofte *-o-*, se la KR ne jam finiĝas per vokalo.

D) La kvazaŭsufiksoj troviĝantaj post kvazaŭ-perfekto-trunkoj.

La en la §§ D kaj E pritraktotaj kvazaŭsufiksoj troviĝas plejofte post formoj deriveblaj el verbaj radikoj. Mi unue donos regulojn per kiuj oni povas derivi tiujn formojn el esperantaj verb-radikoj; poste mi mencias la kvazaŭsufiksojn trovatajn post tiuj

derivitaj kvazaŭ-radikoj. Mia sistemo estas ido de la interlinguea sistemo por certaj per-sufiksaj derivaĵoj el verboj (vidu MANDERS 1947 aŭ 1950, aŭ iun lernolibron de Il, ekz. GRÄBER 1930).

a) El la verbradiko aŭ ZAMENHOF-radiko (ZR) mi unue derivas ion kion mi nomas la DE-WAHL-radiko (DWR), jene:

Se la verbo apartenas al la *a*-klaso, oni akiras la DWR-on aldona al la ZR la literon *-a*. Por verbo el la *i*-klaso oni aldonu *-i* al la ZR. En la kazo de verbo el la *X*-klaso oni forstreku la lastan konsonanton de la ZR. Por la ceteraj verboj la DWR egalas la ZR-on. Ekzemploj: *form-i* (*a*) = *forma-*; *poz-i* (*i*) = *pozi-*; *star-i* (*X*) = *sta-*; *ced-i* (restklaso) = *ced-*.

La klaso al kiu certa verbo apartenas estas ne videbla el la nura ZR; ĝi devas esti speciale indikata.

b) El la DWR mi derivas la t. n. kvazaŭ-perfekto-trunkon (KPT) laŭ jena regulo, ido de la »regulo de DE WAHL« en Il:

Se la DWR finiĝas per vokalo oni aldonu *-t* por akiri la KPT-on. Se la DWR finiĝas per *v* oni ŝanĝu tiun *v* en *ut* (En Il oni trovas tiaokaze kutime *u*: *solver* = solvi). Se la DWR finiĝas per *d* aŭ *r* oni ŝanĝu tiun *d* aŭ *r* en *s* aŭ *z* (En Esperanto oni trovas jen *s*, jen *z*, neregulmaniere; en Il oni trovas ĉiam *s*). Ekzistas kelkaj esceptoj de tiu regulo. En la ceteraj okazoj la KPT egalas la DWR-on. Ekzemploj: *forma-* = *format*; *mov-i* (*X*) = *mo-* = *mot*; *volv-* = *volut*; *ced-* = *ces*; *vid-* = *viz*.

En Il ekzistas tri klasoj de verboj, kies infinitivoj finiĝas per *-ar*, *-er* kaj *-ir*. Al mia DWR respondas en Il preskaŭ ĉiam la formo restanta post la unua paŝo de la regulo de DE WAHL (la forstrekado de la infinitiva *-r*, *-er*, *-r* respektive); al mia KPT la Il-a perfektotrunko, la finrezulto de la regulo de DE WAHL. Ankaŭ de tiu Il-a regulo ekzistas kelkaj esceptoj.

c) Post la KPT oni trovas jenajn kvazaŭsufiksojn:
40 + 42) [115] *-io* (Il *-ion*) ril.: agado aŭ rezulto, finiteco, de agado. La ' indikas ke *-t'io* oni ŝanĝu en *-cio* (*redakti* = *redakcio*).

53) *-orio* (Il *-oria*) ril.: ejo de la KR-a agado.

54) *-ora* (Il *-ori*), adjektivo kiu rilatas al la KR.

53 + 54 = [15].

55) [90] *-oro* (Il *-or*) ril.: aganta persono aŭ aĵo.

56) [45] *-uro* (Il *-ura*) ril.: agado aŭ pli-malpli konkreta rezulto de agado.

57) [50] *-iva* (Il *-iv*), adjektivo kiu rilatas al la KR. Multaj gramatikaj terminoj finiĝas per *-ivo*.

Pere de la ĵus donitaj KS-oj kaj la KP-oj menciitaj sub A kaj B oni nun komprenas ke ekz. *ab-negat-'io* = *abnegacio* kaj *negat-iva*, aŭ *instrukt-'io* kaj *strukt-uro* interrilitas, almenaŭ etimologie. Ankaŭ por pli regula, sistema kreado de neologismoj oni povas uzi tiujn kaj la aliajn KA-ojn; mi tamen deziras denove atentigi pri la avertoj, donitaj en la enkonduko.

Kelkfoje regulaj radikoj estas ankaŭ KPT-oj: *ob-jekt-o* apud *ob-jekt-iva*; ankaŭ, simile: *re-kvizit-o* apud *in-kvizit-'io*, *inkvizit-oro*; *ad-vokat-o* apud *vokat-ivo*, ktp. Ofte temas pri regulaj esperantaj radikoj finiĝantaj per *-at-* kaj *-it-*. Por pliaj ekzemploj vidu § F.

Guste por ke oni povu derivi ĉiujn tiujn internaciajn vortojn el la Il-aj verboj, DE WAHL starigis sian regulon, kaj ankaŭ ne hezitis ŝanĝi verboradikon tiom kiom necesis por la starigeblo de tia regulo: *constructer* = konstrui (donas ekz.: *construction*); sed *evoluer* = evolui (donas ekz.: *evolution*).

Tiu regulo de DE WAHL estas sufiĉe komplika; pro tio la apliko de la Il-aj sufiksoj *-ion* ktp. estas multe pli komplika ol la simpla postmetado de niaj regulaj sufiksoj. Tamen ĝi havas grandan valoron kiel analizilon de la multaj internaciaj vortoj finiĝantaj per *-ion*, *-or* ktp. Tiun meriton oni tuj komprenos esplorante ĉu tian analizan regulon oni povus eltrovi en naciaj lingvoj aŭ en Esperanto. En Esp. tio eblas nur per aldonaj regulo kaj klasifo (por la derivado de la DWR), pro la (pro aliaj kialoj tre oportuna) ekzisto de nur unu verbklaso, kaj plue pro tio, ke dum la farado kaj evoluigo de Esp. oni tiujn aferojn, kuŝantajn ekster la regul-afiksa vortfaradsistemo, ne el tiu ĉi vidpunkto atentis. Rilate la KS-ojn *-'io*, *-oro* ktp. Esperanto tiel fariĝis ne multe pli regula ol ekz. la angla lingvo, kaj iom pli komplika ol Il. (Aliflanke tiaj vortoj en Esp. malpli oftas ol en naciaj lingvoj aŭ Il: anstataŭ *-ion* oni en Esp. ofte uzas *-ado* aŭ simplan *-o*; anstataŭ *-or* ofte *-anto*, *-isto*, ktp.)

E) La kvazaŭsufiksoj troviĝantaj post kvazaŭ-estanteco-trunkoj.

El la DWR mi derivas la t. n. kvazaŭ-estanteco-trunkon (KET) aldonante *-e* al la DWR (*ced-e*, *volv-e*). Sed DWR-oj finiĝantaj per *-a* ne ricevas tiun *-e* (*forma*, *sta*). (Al mia KET respondas en II la aktiva participo sen nur *-nt-* por ĉiuj tri verbklasoj, t. e. *-a*, *-e*, *-ie* respektive por la *-ar*, *-er* kaj *-ir* verboj).

Post KET-oj oni trovas jenajn kvazaŭsufiksojn:

58) [35] *-nt-*, la zamenhofa distingilo de la regulaj aktivaj participoj, formas post KET-oj kvazaŭ-aktiv-participojn: *stude-nto*, *dilige-nta*.

59) [55] *-nco* ril.: *-nt-eco* (*asona-nco*. En Ido *-nt-eso*, en IALA-K-varianto *-nt-so*; vidu MANDERS 1947, 1950). Il uzas *-ie* post la aktiva participo: *existe-nt-ie*.

60) [6] *-nd-* ril.: iu kiu / io kio estas *-enda*. *Divide-ndo*.

Fine mi mencias ankoraŭ:

61) [35] *-ment-* ril.: ilo, rimedo, aĵo (*ligamento*, *parlamento*). Oni trovas ĝin post la DWR.

62) [7] *-(i)bil-*, *-abl-* ril.: *-ebl-*; *Abl-* estas simple postmeta KS; *-(i)bil-* oni trovas, neregulmaniere, jen post DWR-oj, jen post KPT-oj (*probabla*, *aŭtomobilo*).

F) Kelkaj verboj kaj derivaĵoj de kvazaŭ-estanteco- kaj perfekto-trunkoj. Ne nur regulaj, sed ankaŭ kvazaŭaj prefiksoj (kiaj tiuj en A kaj B) estas deprenitaj; tial la ĉi-subaj »ZR-oj« ofte ne troviĝas en la vortaro en la donita »nuda« formo. Ekzistas ankoraŭ multe pli da tiaj formoj; tiuj ĉi ŝajnas al mi la plej gravaj. Post la ZR mi mencias eventualajn neregulajn formojn inter krampoj; post tiuj kelkaj derivaĵojn.

63) [10] *ag* (KPT: *akt*) ril.: *agi*; *age-nto*, *akt-iva*, *akt-oro*.

64) [10] *ced* ril.: *cedi*, *iri*; *ak-ces-ora*, *pro-ces-o*, *pro-ces-'io*.

65) [9] a) *cip* (*a* aŭ *i*) ril.: *preni*; *anti-cip-i*, *parti-cip-o*. b) *cept* ril.: *preni*; *ak-*, *kon-*, *per-cept-i*.

66) [3] *dakt* ril.: *lerni*; *re-dakt-i*, *-oro*, *-'io*.

67) [5] *dik* (*a*) ril.: *indiki*; *pre-dik-i*, *in-dikat-ivo*.

68) [4] *dikt* (*a*) ril.: *diri*, *dikti*; *diktat-oro*.

- 69) (L. *dare* = doni =) dat-ivo, a-dit-'io, kon-dit-'ionalo.
- 70) [12] *duk* (DWR: *dukt*) ril.: konduki, gvidi; e-duk-i, traduk-i, kon-dukt-oro, via-dukt-o.
- 71) a) *fik* (*a*), *fic* (*i*) ril.: fari; e-fik-i, ko-e-ficie-nto, de-ficit-o, b) *fakt*, *fekt* ril.: fari; e-fekt-iva, fakt-oro, in-fekt-i.
- 72) *-if-i*, *-ifik-i* (*a*) ril.: -igi; klas-if(ik)-i, mod-ifi. (vidu ankaŭ *-izi* (*a*), 124). 71 + 72 = [40].
- 73) [18] *fer* (KPT: *lat*) ril.: porti; di-fere-nco, re-fere-nd-ario, ab-lat-ivo, super-lat-ivo.
- 74) [11] *form(a)* ril.: formi; re-format-'io, trans-format-oro.
- 75) [12] *jekt* ril.: ĵeti; in-jekt-i, ob-jekt-iva.
- 76) [10] *kur* (KPT: *kurs*) ril.: kuri, iri; kon-kure-nco, eks-kurs-o, kurs-iva.
- 77) [20] *leg*, *lekt* ril.: legi, elekti; pre-leg-i, lege-ndo, e-lekt-i, lekt-oro.
- 78) [11] *mit* (KPT: *mis*, *miz*) ril.: meti; inter-mit-i, kom-promit-i, mis-'io, re-miz-o.
- 79) [11] *mov* (X) ril.: movi; mo-bil-izi, mo-mento, mot-oro, pro-mot-'io.
- 80) [6] *nomin(a)* ril.: nomi; de-nominat-oro, nominat-ivo (vidu ankaŭ *-onim-*, *-nom(in)-*, 48a).
- 81) [6] *plik(a)* ril.: faldi; a-plik-i, kom-plik-i, du-plikat-o.
- 82) [20] *poz(i)*, *pon* ril.: meti; de-pon-i, eks-pone-nto, su-poz-i, pre-pozit-'io, pozit-iva.
- 83) [9] *seg*, *sekt*, *sek(a)* ril.: tranĉi; seg-mento, seka-nto, sekt-oro, sekt-'io, in-sekt-o.
- 84) [10] *serv*, *zerv(i aŭ a)* ril.: servi, teni; re-zerv-i, konservat-iva, ob-servat-orio.
- 85) [8] *spekt* ril.: vidi, rigardi; a-spekt-i, re-spekt-i, in-spekt-oro, per-spekt-ivo.
- 86) [25] *star* (X) ril.: stari; di-sta-nco, in-sta-nco, stat-'io, stat-uro.
- 87) [4] *stitu* ril.: starigi; in-stitut-o, kon-stitut-'io.
- 88) [7] *stru* (KPT: *strukt*) ril.: meti; de-(s)tru-i, instru-mento, in-strukt-'io, strukt-uro.
- 89) [9] a) *vert* (KPT: *vers*) ril.: turni, ŝanĝi; kon-vert-i, di-vers-a. b) *vers(a)*: kon-versat-'io.

90) [20] *vid* ril.: vidi; e-vide-nta, pro-vide-nco, pro-viz-i, re-viz-'io, di-viz-oro.

G) Aliaj gravaj kvazaŭsufiksoj (kutime simple postmetaj).

91) [45] (G) *iko* (Il -ica) ril.: scienco, arto, metio kaj aliaj viv-regionoj (*akustiko, etiko, politiko*). Grava subgrupo: 91a) (G) -*tekniko*. -*Ika* (Il -ic), adjektivo kiu rilatas al la KR. Plue -*ik* vortoj estas diversspecaj: vivaĵoj, aĵoj, aferoj, materialoj, landoj, malsanoj ktp. (*urtiko, keramiko, koliko*).

92) [110] (L) -*al* ril.: adjektivo (aŭ substantivo) kiu rilatas al la KR. Variantoj -*ual-* (*aktuala*) kaj malofte eĉ -*'ional-* (*racionalismo*).

93) [75] -*ism-* estas pli-malpli interna okazo: ĝi naskas regulajn kaj kvazaŭajn derivaĵojn.

a) -*ism-* = idearo rilate religion, politikon, arton ktp: *kubismo, komunismo*. La ano de -*ismo* estas -*isto*, se ne la radiko mem (kiel en *katolik-ismo*).

b) -*ism-/asm-* ril.: eco, aĵoj, aferoj (*arkaismo, pleonasmo*). La regula sufikso -*ist-* rilatas al -*ism-* pro sia signifo »ano de -ismo« ,

H) Kelkaj kvazaŭ-afiksoj kiuj rilatas al nombroj, kvantoj.

94) [3] (G) *hemi-** ril.: 1/2.

95) [10] (G) *mono-** ril.: unu(ope).

96) [5] (L) *prim-/prin-* ril.: la unua, antaŭa.

97) [7] (L) *un(i)-* ril.: unu.

98) [8] (L) *bi-* ril.: 2; *bini-* ril.: po 2.

99) [7] (G) *di-* ril.: 2.

100) [7] (L, G) *du(a)-* ril.: 2.

101) [11] (L, G), *tri-* ril.: 3.

102) [10] (L) *kvadr-/kvar-* ril.: 4.

103) [11] (L) *kvint-* ril.: 5.

104) [1] (G) *heksa-** ril.: 6

105) [3] (L) *sept-* ril.: 7.

106) [9] (G) *okt-* ril.: 8.

- 107) [11] (L) *dec(i)-* ril.: 10, $\frac{1}{10}$; (G) *deka-** ril.: 10.
 108) [7] (L) *cent(i)-* ril.: 100, $\frac{1}{100}$.
 108a) [6] (G) *hek(a)to-** ril.: 100.
 109) [2] (G) *kilo-* ril.: 1000.
 109a) [4] (L) *mil(i)-* ril.: 1000, $\frac{1}{1000}$.
 110) [2] (G) *miria-** ril.: 10.000, tre multe.

I) Diversaĵoj.

- 111) [22] *-ado* kiel KS ril.: aĵo (*dekado, monado*).
 112) [5] (G) *bio-* ril.: vivo.
 113) [5] (G) *ciklo-** ril.: cirklo, rondforma.
 113a) [10] (L) *cirk-* ril.: ĉirkaŭ-, rondforma.
 114) [5] (L) *ekv(i)-* ril.: egal-, samkvant- (*ekvacio*).
 115) [50] *-eno* ne havas fikseblan signifon; ĝi tial taŭgas por evitado de homonimoj. La samon oni povas rimarki rilate *-el-*, kaj ankaŭ pri la multaj falsaj *-onoj*, *-anoj*, *-inoj*, *-idoj* kaj *-eroj* en nia lingvo. Oni povas rezoni, ke ekzemple se evidente ne temas pri vivaĵo, finaĵo *-in-* ne povas pensigi pri la ina sekso (*albumino, mandolino*). Tiaokaze ankaŭ tiuj vorteroj estas uzeblaj kiel homonim-evitiloj.
 116) [30] *-eo* ril.: -ejo. Sed ekzistas multaj nekapteblaĵoj; do tiu KS estas ofte uzebla kiel homonim-evitilo.
 117) [7] (G) *-for-/* (L) *-fer-* ril.: -portanta, -havanta.
 118) [7] (G) *-fon-* ril.: sono.
 119) [6] (G) *-fos-, -fot-* ril.: lumo.
 120) [18] (G, L) *gen-, gener-* ril.: speco, gento, deveno.
 121) [5] (G) *geo-** ril.: la Tero.
 122) [9] (G) *hidro-** ril.: akvo, likvaĵo.
 123) [25] *-id-* kiel KS ril.: stato, materialo *timida, oksido*. Multaj nekapteblaĵoj. (Vidu sub 115).
 124) [25] (G) *-izi (a)* ril.: -igi. Vidu ankaŭ *-ifi, ifiki (a)*, 72.
 125) [5] (G) *krono-** ril.: tempo.
 126) [16] (L) *magn-/* (G) *makro-** ril.: granda; (L) *maj-* ril.: pli granda.
 127) [4] (G) *mikro-** ril.: malgranda.
 128) [7] (G) *naŭt-,* (L) *nav-* ril.: ŝip(veturad)o, mar-aĵoj.
 129) [10] (G) *-od-* ril.: 1) odo, 2) vojo.

- 130) [5] (G) *-oid-* ril. -simil-, -form-, -ec-.
 131) [8] (G) *pod-/* (L) *ped-* ril.: piedo, bazo.
 132) [9] (G) *-skopo* ril.: iu kiu / io kio vidas, observilo.
 133) [5] (L) *-(i)tato* ril.: instituto, ejo, istaro (*universitato, admiralitato*).
 134) [11] (G) *-tezo* ril.: metado; *-teto, -temo* ril.: metitaĵo; *-teko* ril.: »met-ejo« (*hipotezo, biblioteko*).
 135) [10] (G) *teo-** ril.: dio.
 136) [30] (L) *-us-*. Sen signifo, do uzebla kiel homonim-evitilo.
 137) [3] (L) *-(it)udo* ril.: -eco (en sciencaj terminoj).

Nur post la finverkado de la ĉi-supra artikolo mi ekhavis la »Interlingua English Dictionary«, eldonitan de IALA (GODE & al. 1951). Post ioma pristudado de tiu vortaro ŝajnas al mi, ke por plua laboro pri la sistemo de kvazaŭ-derivado ĝi povas esti grava helpilo. Tiurilate ŝajnas al mi iomete avantaĝe, ke la IALAA vortaro havas »historian« ortografion. Tiu trajto—cetere laŭ mi por la praktika uzado de la IALAA planlingvo grava malavantaĝo—kelkfoje efikas pliklarige; la esperanta ortografio forigas kelkajn diferencojn kiel ekz. inter *hypo-* kaj *hippo-*. IALA ne klopodis starigi regulon similan al la DE WAHL-a. Ŝajnas al mi, ke kaj por regula verba derivado en naturalisma lingvo (kia IL.) kaj por kvazaŭ-derivado en skemisma lingvo (kia nia) tia regulo (ankaŭ se eble ĝi havas esceptojn) estas avantaĝo.

An effort to establish a system of quasi-affixes in Esperanto

The roots of Esperanto often contain word parts which resemble affixes, and which really once were affixes, prepositions used as prefixes, etc., especially from the Latin and Greek languages. An example is *ko-*, *kom-*, *kon-*. The significance of these quasi-affixes is sometimes clear (that of *ko-* etc. is often »together«), but often it is vague or there is more than one significance. In this article I try to establish a system of these quasi-affixes. Approximately as in Interlingue (formerly called Occidental), this system analyzes the words primarily according to their etymology, and some of the affixes (e. g., *-or-*, *-iv-*, *-nc-*) are found almost exclusively after quasi-verbal forms that remind one of the perfect and present stems of Interlingue. In some respects the system of quasi-affixes is less regular than that of Interlingue. Many prefixes

show the phenomenon of assimilation. Only with the help of an additional rule can one formulate such a rule, already rather complicated, as that of DE WAHL. Nevertheless such a system of quasi-affixes could be useful for analyzing (if sometimes even only etymologically) those words (roots) which the regular system cannot analyze. In that manner it could facilitate the learning of words, especially in scientific language. Finally I want to stress that a clear distinction should always be made between the system of regular affixes and any system of quasi-affixes. Such a system of quasi-affixes should be used primarily as a tool for analyzing words, not for creating neologisms in quantity. We should not refrain from the schematical word formation of Esperanto that is of such a great advantage for its *active* use.

BIBLIOGRAFIO

- ALBON, A.; 1949: Esperanto, racia scienca lingvo? — Heroldo de Esperanto, 25(1101) : 2.
- DELLIAN, C.; 1948: Problemoj koncerne la temon »Esperanto kaj scienco«. — Heroldo de Esp., 24(1094) : 2.
- GILBERT, W.; 1950: Pri »naturalistaj« sistemoj. — Heroldo de Esp., 26(1120) : 2.
- GODE, ALEXANDER & al.; 1951: Interlingua-English Dictionary. New York.
- GRÄBER, E.; JANOTTA, K.; PIGAL, E.; PROROK, J.; RAMSTEDT, A. & WAHL, E. v.; 1930: Occidental die Weltsprache, 2a eld. Stuttgart.
- MANDERS, W. J. A.; 1947: Vijf Kunsttalen. Purmerend, Nederlando.
- ; 1950: Interlingvistiko kaj Esperantologio. Purmerend, Nederlando.
- NEERGAARD, PAUL; 1933: Fremdvortoj en Esperanto. Paris.
- VEER, C. L. DE; 1936: Schildlof's Zakwoordenboekje Esperanto. 3a eld. Amsterdam.
- WIENER, F. I.; 1951: Ŝajnprefiksoj. — Esperantologio I (n-ro 3) : 145—151.

Bibliografio de esperantologia literaturo 1940-1948

de D-ro PAUL NEERGAARD

III

E—02. Filogeneza lingvoevoluo

DEGENKAMP, G. J.: Esperanto 60-jara. Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura. Amsterdam 1947. 58 p.

WARINGHIEN, G.: [recenzo pri] Degenkamp: Esperanto 60-jara. — Sennaciulo 19 (n-ro 2): 5—6, 1948.

Problemoj solvendaj. — La Progresanto 10: 9—10, 17—18, 25—26, 1948.

E—1. Ortografio (daŭrigita)

KRUIT, W. F.: Pri »k«. — La Progresanto 8: 77, 1946, kaj Sennaciulo 17 (n-ro 10): 3, 1946.

OEVI, PETRO: Pri »k«. — Sennaciulo 18 (n-ro 5): 7, 1947.

E—2. Parolpartoj (partes orationis)

E-22. Substantivoj (daŭrigita)

Verbale zelfstandige naamwoorden. — La Progresanto 8: 22—23, 30, 48, 1946.

E-25. Verboj (daŭrigita)

Onpersoonlijke werkwoorden. — La Progresanto 8: 86—88, 1946.

Oorzakelijke werkwoorden (Kaŭzativoj of faktitativoj). — La Progresanto 8: 62—63, 71, 1946.

Wederkerende werkwoorden (refleksivaj verboj). — La Progresanto 9: 32, 38, 48, 1947.

Wederkerige werkwoorden (verboj de reciprokeco). — La Progresanto 9: 94—95, 1947.

E-27. Adverboj (daŭrigita)

BRUINS, C. & SCHEEPEN, J. VAN: Ankoraŭ pri »ĉu ne?«. — La Progresanto 10: 48, 1948.

DOLINSKÝ, J. V.: Rimarkoj pri la adverbo »ja«. — Esperantista, Praha, n-ro 10: 116, 1947. (x)

SCHEEPEN, J. VAN: Ĉu ne? — La Progresanto 10: 18, 1948.

— : Respondo al k-do Slijper [pri »ĉu ne?«]. — La Progresanto 10: 58, 1948.

- SLIJPER, CHR. F. W.: Ĉu ne? [kun noto de la red.]. — La Progresanto 10: 39—40, 1948.
 — : Lastfoje pri »ĉu ne?« [kun noto de la red.]. — La Progresanto 10: 56, 1948.
 STUTTARD, MASON: Pri »nun kun -is« [kun noto de la red.]. — La Progresanto 9: 60, 1947.
 La adverboj en Esperanto. — La Progresanto 10: 8, 15, 22, 1948.
 Maniero — grado — kvanto. — La Progresanto 10: 73—74, 1948.

E-281. Konjunkcioj

Tempindikaj konjunkcioj. — La Progresanto 9: 39—40, 1947.

E-282. Prepozicioj (daŭrigita)

STUTTARD, MASON: Respondo pri »escepte de« kaj »kun escepto de« [kun noto de la red.]. — La Progresanto 9: 63—64, 1947.
 WARINGHIEN, G.: Pri dum kaj ĝis. — Sennaciulo 19 (n-ro 5): 6, 1948.
 Kompatinda logiko! [pri »dum kiam«]. — La Progresanto 10: 62, 1948.

E-316.4. Fakaj vortoj. Teknikaj vortoj (daŭrigita)

38. Komerco. Trafiko. (daŭrigita)

HUBKA, ZDENĚK: Cizinec pred pultem. Prehledná pomucka pro obsluhu v cizích jazycích v maloobchodu [Fremdulo antaŭ la vendotablo. — Sinoptika helpilo por fremdlingva priservado en la komercejoj]. Rusa-angla-franca-hispana-germana-Esperanta. Praha 1948. 16 p. kun pluaj varolistoj de 20 komercaj branĉoj. La esperantan parton verkis JAROSLAV MARIK (x). [enhavas i. a. terminojn neniam antaŭe aperintajn].

51. Matematiko

VELTHOVE, H.: El algebro kaj aritmetiko. — La Progresanto 10: 14—15, 19, 1948.

59. Zoologio (daŭrigita)

MAKKINK, G. F.: Nomoj de kelkaj plej oftaj nederlandaj birdoj. — La Progresanto 10: 47—48, 54, 64, 70—71, 1948.

61. Medicino

Nomaro de malsanoj en Esperanto. — La Progresanto 9: 80, 1947.

62. Tekniko. Inĝenierarto (daŭrigita)

MARIK, JAROSLAV: Armea terminaro ĉeĥa-esperanta. — Esperantista, Praha, 3: (n-ro 2): 19—20, 1948 (x).
 Fervojistaj terminoj. — Esperantista, Praha, n-ro 9—10: 96, 1948 (x).

Distrado. Ludo. Sporto (daŭrigita)

LINDBERG, TORSTEN: Sakterminoj en Esperanto. — *La Progresanto* 9: 69, 1947.

E—4. Fonetiko (daŭrigita)

Ĉu fonetike aŭ ne? — *La Progresanto* 8: 65—66, 73, 1946.
Io pri la akcento. — *La Progresanto* 10: 89—90, 1948.

E—5. Gramatiko (daŭrigita)**E-541.2. Vortsenco. Semasiologio** (daŭrigita)

- [BAILEY, WILLIAM]: On the meaning of the word »ŝati«. — *Brit. Esp.* 32 (n-ro 422—423): 217, 1940.
BAILEY, WILLIAM: Kiel traduki la verbon »to like«. — *Brit. Esp.* 32 (n-ro 424—425): 236—237, 1940.
BAILEY, WILLIAM: Pri unu senco de la vorto »artikolo«. — *Brit. Esp.* 33 (n-ro 429—430): 9, 1941.
ENGHOLM, STELLAN: Lingvaj sugestoj. — *Malgranda Revuo* 1948 (n-ro 3) (laŭ *La Progresanto* 10: 65).
GILL, JOHN A.: Pensoj pri la strukturo de Esperanto. — *Brit. Esp.* 32 (n-ro 426—428): 248—249, 1940.
GOMOJOCŬO: Vortelasteco. — *Heroldo de Esp.* 23 (n-ro 1045): 4, 1947.
[JUNG, TEO]: Pasinta, lasta, fina. — *Heroldo de Esp.* 22 (n-ro 1058): 4, 1946.
PAWLIK, RUDOLF; K. KALOCSAY & JOS. CERNY: [notoj pri] Devi-deveti. — *Lit. Mondo* 3. periodo, 2 (n-ro 9—10): 154—155, (n-ro 11—12): 185, 1948.
R[OSSETTI], R[ETO]: Jam kun os. — *Brit. Esp.* 36 (n-ro 521—522): 192, 1948.
SZILÁGYI, F.: Vort-figuroj [metaforoj]. — *Svenska Esp.-Tidn.* 32 (n-ro 2): 12—13, 1944.
Intensieven en deminutieven. — *La Progresanto* 8: 5, 1946.
Mankipovaj vortoj. — *La Progresanto* 10: 65, 1948.

E-541. 3. Vortpruntado. Vortenkonduko

- AGRICOLA, GEORGES: La transskribo en Esperanton de personaj nomoj. — *Esp.* 41 (n-ro 516): 119—121, 1948.
AYMONIER, C.: Kelkaj memoraĵoj kaj pripensoj. — *Franca Esp.* 14 (n-ro —): 15, (n-ro 79): 8—9, (n-ro 80): 18, 1947.
[BUTLER, M. C.]: Technical Terms en Esperanto. — *Brit. Esp.* 35 (n-ro 485—486): 69—72, 1945.
[BUTLER, M. C.]: New Roots in Esperanto. — *Brit. Esp.* 35 (n-ro 489—490): 104—105, 1946.

- [BUTLER, M. C.]: Proper Names. — Brit. Esp. 36 (n-ro 507—508): 65—67, 1947, (n-ro 517—518): 152—155, (521—522): 190—191, (n-ro 523—524): 199—201, 1948.
- DRONCHAT & ESCHENBERGER: Voknomoj. — Franca Esp. 16 (n-ro 100): 4—5, 1948.
- HROMADA, R.: Vortoj kaj esprimoj el milita kaj postmilita tempo. — Esperantista, Praha, n-ro 4: 38—39, 1947 (x).
- H-T, G.: Esperanto — evoluanta kulturfaktoro [pri bezono de sciencaj terminoj] — Arbetar Esperantisten (n-ro 5—6): 4—5, 1943.
- KALOCsAY, K.: La neologisma problemo. Respondo al k-do L. Melotte. — Int. Kulturo 3 (n-ro 1—2): 23, 1948.
- LEGRET, A.: La deveno de »vodevilo«. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1069): 4, 1947.
- MACPHERSON, N. H. C.: Pripensinda negravaĵo [biciklo-biciklo]. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1065): 4, 1947.
- MARIK, JAROSLAV: Aldono de novtempaj terminoj al la Granda vortaro ĉeĥa-Esperanta de J. kaj K. Filip. 4 paĝoj. Prerov 1949 [enhavas plejparte la novan, popoldemokratian terminaron] (x).
- NYLÉN, PAUL: Kion diris Zamenhof pri neologismoj. — Svenska Esp.-Tidn. 31 (n-ro 1): 11, 1943.
- SALEX: Maso kaj pezo. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 2): 12, 1946.
- SOLZBACHER, W.: The Loom of Language [rezenzo de samtitola libro de Frederic Bodmer, New York 1944]. — Am. Esp. 59 (n-ro 7—12): 50—54, 1944.
- SOLZBACHER, W.: The non-european languages and Esperanto. — Am. Esp. 60 (n-ro 11—12): 124—126, 1945.
- SZ[ILÁGYI], F.: Mal-vortoj. Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 3): 22, 1944.
- VERDANO: Pri derivoj. — Brit. Esp. 36 (n-ro 517—518): 149—150, 1948.
- Grafoj, grafistoj aŭ grafiistoj? — La Progresanto 9: 80, 1947.
- Vortoj kaj esprimoj el milita tempo. — La Progresanto 8: 8, 15, 20, 64, 72, 1946.

E-541. 4. Etimologio. Vortkunmetado

- ENGHOLM, STELLAN: Daŭrigi. — Svenska Esp.-Tidn. 33 (n-ro 1): 12, 1945.
- GERDMAN, BIRGER: [Daŭrigi]. — Svenska Esp.-Tidn. 33 (n-ro 1): 4, 1945.
- GERDMAN, BIRGER: Daŭrigi. — Svenska Esp.-Tidn. 33 (n-ro 7—8): 55, 1945.
- K. L. [LANGGAARD, K.]: Pri la Esperanta vortprovizo. — Dansk Esp.-Tidende 3 (n-ro 11—12): 144—145, 1942; 4 (n-ro 1—2): 6—7, 1943.
- SCHEEPEN, J. VAN: Vortkunmeto. — La Progresanto 9: 73—75, 1947.

E-55. Morfologio

- BAILEY, WILLIAM: Pri la kondiĉa modo. — Brit. Esp. 32 (n-ro 426—428): 250—251, 1940.
- BAILEY, WILLIAM: Kiu modo post »kvazaŭ«? — Brit. Esp. 33 (n-ro 433—434): 42, 1941.
- BUTLER, M. C.: Verba modo post »kvazaŭ«. — La Progresanto 9: 7, 1947.
- COPPENS, C. J.: Ĉu Esperanto estas facila? [pri akuzativo]. — Sennaciulo 18 (n-ro 11): 6, 1947.
- ENGHOLM, S.: Verba modo post »kvazaŭ«. — La Progresanto 8: 94, 1946.
- MOTH, POUL: Pri la facilo de Esperanto [pri akuzativo]. — Sennaciulo 18 (n-ro 7): 6, 1947.
- RÉGULO PÉREZ, J.: Ankoraŭ pri la facileco de Esp-o. — Sennaciulo 18 (n-ro 11): 6, 1947.
- R. L.: ata-ita. — Sennaciulo 19 (n-ro 9—10): 9, 1948.
- SCHEEPEN, J. VAN: Per mezuro kaj peko akiriĝas sukceso. Kvazaŭ . . . us. — La Progresanto 8: 81—82, 1946.
- WAARD, M. DE: Ĉu Esperanto estas facila? [pri akuzativo]. — Sennaciulo 18 (n-ro 2): 2, 1947.
- Ĉu akuzativo aŭ ne? — La Progresanto 9: 16, 1947.
- Nominativo aŭ akuzativo? — La Progresanto 9: 88, 1947.
- Singularo-pluralo. — La Progresanto 9: 41—42, 49—50, 57—58, 1947.
- Verba modo post »kvazaŭ«. — La Progresanto 9: 17—18, 1947.

E-56. Sintakso

- HOOG, H. A. DE: »Peti al« aŭ »de« [kun noto de la red.]. — La Progresanto 9: 29—30, 1947.
- KIDO, MATAZI: Adjektivo kaj adverbo. Pri gramatikaj problemoj 2. — La Revuo Orienta 29 (n-ro 11): 248—251, 1948.
- QUARELLO, DANIEL: Komplementoj de l' substantivo. Quarello & Cia, Buenos Aires 1948, 62 p.
- Adjektivo aŭ adverbo? — La Progresanto 10: 57—58, 1948.

E-6. Metriko. Prozodio

- CLARK, BRENDON: Kelkaj teorioj pri verstradukado. — Esp. Int. 10 (n-ro 8): 122—124, 1946.
- CLARK, BRENDON: Kelkaj opinioj pri verstradukado. — Esp. 40 (n-ro 501): 107—108, 1947.
- CLARK, BRENDON: Malnovaj lampoj (Tezo Metrika). — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 7—8): 105—107, (n-ro 9—10): 146—148, (n-ro 11—12): 178—179, 1948.
- FOUSEK, JOSEF: Jak prekládati pro zpev? [Kiel traduki por la kanto?]. — Esperantista, Praha, n-ro 8: 85, 1948 (x).
- KALOCSAY, K.: Pri la poetiko de la »Malnovaj Lampoj«. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 11—12): 180—181, 1948.

KAMARYT, STANISLAV: Verŝe v esperantu [Versoj en Esperanto]. — Esperantista Praha, n-ro 2: 13—15, 1948 (x).

LANGGAARD, K.: Pri la Esperanta rimado. — Dansk Esp.-Tidende 3 (n-ro 5—6): 80—81, 1942.

○ **E—8. Fontoj de la filologio kaj lingvistiko**

E-82. Literaturaj tekstoj

BAILEY, WILLIAM: Vortoj kursivaj en la fundamenta krestomatio. — Brit. Esp. 34 (n-ro 473—474): 152, 1944.

BUTLER, M. C.: La Biblio en Esperanto. — La Progresanto 10: 36, 1948.

WARINGHIEN, G.: Leteroj de L. — L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de . . . I. 1901—1906. 269 p. S. A. T. Paris 1948.

E: 4. Esperanto kaj lingvoscienco

MANDERS, W. J. A.: Esperanto kaj lingvistiko. — Speciale verkita por Esperantista, Praha, n-ro 9: 102—103, 1947 (x).

MANDERS, W. J. A.: Esperanto kaj lingvoscienco. — Espero Katolika 45: 28, 1948, 46: 4—5, 1949.

E: 4: 389.6. Esperanto kaj lingvonormigo

NEERGAARD, PAUL: Internacia lingvonormigo kaj esperanto (resumo de prelego en la Laborista Universitato dum la 20a SAT-kongreso en Aarhus). — Sennaciulo 18 (n-ro 12) 7, 1947.

E: 407. Esperanto kaj lingvoinstruado

[BOVET, PIERRE & ITH, HENRIETTE]: Enketo pri internacia helplingvo. Eldonita de Sveda Esperanto-Federacio. Stockholm 1948. 32 p.

E: 408.9. Esperanto kaj planlingvoj.

Kompara interlingvistiko

JACOB, H.: A planned auxiliary language, London 1947. 160 p.

MANDERS, W. J. A.: Vijf kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial. Purmerend 1947. 386 p.

Recenzoj pri MANDERS: Vijf kunsttalen:

BELLIE, A. DE: Vijf Kunsttalen (»Kin Lingui Artifical«). Progreso okt.—dec. 1947: 37—41 (xx).

COLLINSON, W. E.: Vijf Kunsttalen. — Esperanto 40 (n-ro 504): 150—151, 1947.

- COLLINSON, W. E.: W. J. A. Manders, Vijf Kunsttalen. — *Lingua* 2: 386 ff., 1949 (xx).
- HEILKER, P.: Vijf Kunsttalen. — *Aristo* Juli 1947: 228—233 [nederlande] (xx).
- HKB (BOUSKA, H. K.): Ridindaj ludemuloj. — *Esperantista*, Praha, n-ro 6: 63, n-ro 8: 92 (xx).
- J[UNG], T[EO]: Kvin artlingvoj. — *Heroldo de Esp-o* 23 (n-ro 1070): 1—2.
- MATEJKA, A.: Un exemple a imitar. — *Cosmoglotta* nr. 134, serie A, aug. 1947 (xx).
- SMEEHUYZEN, J.: . . . — *Espero Katolika*, junio 1947 (xx).
- SOLZBACHER, W.: Dutch Linguist analyzes interlanguage structure. — *Am. Esp.* 62 (n-ro 9—10): 69—73, 1947.
- WARINGHIEN, G.: Esperanto antaŭ la tribunalo. — *Lit. Mondo* 3. periodo, (n-ro 3—4): 35—43, (n-ro 5—6): 73—78, 1948.
- Vijf Kunsttalen. — *Brit. Esp.* 35 (n-ro 513—514): 116, 1948.
- MANDERS, W. J. A.: Otto Jespersen kaj liaj helplingvaj teorioj. — *Espero Katolika* 44: —, 138—139, 149—150, 171, 1947.

Signaturo uzita

- (x): komunikita de s-ro J. Marik al la kompilinto.
- (xx): komunikita de D-ro Manders laŭ peto de la kompilinto.

NEKROLOGOJ

Camille Aymonier

naskiĝis la 17. IX. 1866 apud Besançon, mortis la 14. IX. 1951 en Pariza hospitalo. Agregacia profesoro, li instruis klasikajn lingvojn en Grenoble, Bordeaux kaj fine en Parizo (liceo Buffon). Lia kulturo estis vasta, li estis membro de la Pariza »Société de Linguistique« kaj verkis plurajn interesajn verkojn pri la franca literaturo kaj provinca historio. Esperantiĝis ĉ. 1901, proksimume en la sama tempo kiel Bourlet kaj Cart, sed li estis kaj tro modesta kaj tro respektama pri la opinioj de la aliaj por egali ilin kiel propagandisto. Tamen, kiam lia kolego Grosjean-Maupin varbiĝis en 1906, li estis varmigita de ties agemo kaj iniciatemo kaj komencis fruktodonan laboron sur la lingva tereno. Lia gramatiko estis bonega instruilo por la francoj, kaj — kvankam ni nun povas apenaŭ kompreni, kiel li (kaj ankaŭ la aliaj tiamaj esperantologoj) ne provis akiri de Zamenhof pli multajn informojn pri la historio de la lingvo kaj konsilojn pri ĝia uzado je kelkaj gravaj punktoj — tiu gramatiko prezentis por tiu tempo decidan antaŭenpaŝon al efektiva sciado kaj scienca esplorado de la lingva mekanismo. Sed estas la krizo kaŭzata de Ido, kiu vere vekis lian batalemon. Li apogis siajn kolegojn per trafa, sprita

kaj penetrema polemiko: li analizis la kontraŭproponitan dialekton kaj malkovris kaj reliefigis ĉiujn ĝiajn mankojn kaj erarojn. Oni povas diri, ke dank'al liaj tiutemaj verkoj, la Ido-afero estis definitive kondamnita antaŭ la lingvistoj. Post la unua mondmilito, li verkis kelkajn broŝurojn de altnivela propagando, en kiuj li aplikis al nia lingvo la teoriojn de la svisa lingvisto Bally. Kiam li emeritiĝis, li transloĝiĝis al Bordeaux kaj de tiam malmulte okupiĝis pri nia movado. La dua mondmilito faris al li doloran vundon, kaj li finis sian vivon en malfeliĉaj kondiĉoj, kiujn li fiere ne volis malkaŝi eĉ al amikoj.

Lingvo-Komitatano en 1909, li fariĝis membro de la Akademio en 1932 kaj memvole ekŝiĝis en 1936, por lasi lokon al pli junaj.

Talenta, gustoplena kaj erudicia homo, kiu faris grandajn servojn al nia movado, kaj povus fari ankoraŭ pli grandajn, se li estus dediĉinta pli funde al ĝi sian fantazion kaj laboremon. Li ĉiam verkis unue en franca lingvo, kaj kvankam lia esperanta stilo estis pura kaj eleganta, li tro malmulte publikigis en Esperanto por esti ĝuste ŝatata de la ne-francaj legantoj, bedaŭrinde.

G. WARINGHIEN.

BIBLIOGRAFIO

1. L'Esperanto, Solution logique et pratique du problème de la Langue Internationale. 12 × 16 cm., 47 p. Grenoble, 1902.
2. L'Esperanto, Réponse à des critiques. (Aparta depreso de »La Revue du Mois«) 16 × 24 cm., 15 p. Paris, 1909.
3. Cours Méthodique d'Espéranto. Grammaire complète. 11 × 17,5 cm., 174 p. Hachette, Paris, 1909.
4. Cours Méthodique d'Espéranto. Versions, par Aymonier et Grosjean-Maupin. 11 × 17,5 cm., 136 p. Hachette, 1909.
5. Cours Méthodique d'Espéranto. Thèmes, par Aymonier et Grosjean-Maupin. 11 × 17,5 cm., 132 p. Hachette, 1910.
6. Cours Méthodique d'Espéranto. Corrigé des Thèmes, par Aymonier et Grosjean-Maupin. 11 × 17,5 cm., 92 p. Hachette, 1910. (*La traduko estas ne ĉiuloke fidinda*).
(*La n-oj 3—6 estis plurfoje reeldonitaj de la Pariza Centra Librejo.*)
7. Conférence contradictoire sur l'Espéranto et l'Ido: Orateurs Professeur Aymonier, Camarade Papillon. 11 × 17,5 cm., 64 p. Fédération Syndicale Espérantiste, Bourse du Travail, Paris, 1912.
8. Autour de l'Espéranto. Discussion de quelques modifications projetées. 16 × 24 cm., 74 p. Office Central Espérantiste, Paris, 1912.
9. Pri Esperanto. Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de Ido proponitaj. Esperantigis René Ferter. 16 × 24 cm., 68 p. Esperantista Centra Officejo, Parizo, 1913. (*traduko de n-ro 8.*)
10. Histoire d'une Délégation pour l'Adoption d'une Langue Auxiliaire Internationale. 14 × 21,5 cm., 56 p. Société des Amis de l'Espéranto, Paris, 1914.
11. Une langue vivante artificielle (Commentaire de l'Espéranto). 15,5 × 24 cm., 62 p. Office Central Esperantiste, Paris, 1917.
12. Lazaro-Ludoviko Zamenhof. (*Funebra parolado, en franca kaj Esperanta lingvo*). 15,5 × 24 cm., 31 p. Samloke, 1918.
13. Essai sur la Dérivation Comparée dans les Langues naturelles et artificielles. 12,5 × 20 cm., 134 p. Samloke, 1921.
14. L'Espéranto, Langue première de l'Enseignement. Introduction à l'étude du langage en général et du français en particulier. 13 × 19 cm., 91 p. Les Presses Universitaires, Paris, 1925.

N.B. Aymonier kunlaboris en la »Revuo« de Bourlet, kaj en »Franca Esperantisto«, en kiu lasta gazeto li interalie publikigis en 1950 tradukon de serio da francaj proverboj.

G. W.

Alice Vanderbilt Morris

Alice Vanderbilt Morris, vidvino de Dave Hennen Morris, kiu de 1933 al 1937 estis usona ambasadoro en Belgujo kaj usona ministro en Luksemburgo, mortis 75-jara en Bar Harbor, Ŝtato Maine, Usono, la 15-an de Aŭgusto 1950. En la interlingvistika movado ŝi ludis gravan rolon kiel fondintino kaj honora sekretariino de IALA (*International Auxiliary Language Association in the United States*, Usona Asocio por Internacia Lingvo).

S-ino Morris sukcesis veki intereson de usonaj kaj eksterlandaj eminentuloj pri la problemoj de internacia lingvo. Dum multaj jaroj ŝi favoris Esperanton. Ŝi bone legis kaj iomete parolis la lingvon. Aliflanke ŝi tute estris la agadon de IALA, kiu sub ŝia influo kelkfoje ŝanĝis siajn principojn kaj laborprogramon laŭ maniero, kiun kelkaj observantoj konsideris neobjektiva. La ĉefa ŝanĝo okazis en 1933, kiam s-ino Morris decidis kaj igis la komitaton de IALA decidi, ke IALA ellaboru propran lingvoprojekton. Ĝis tiam IALA sekvis sian programon de 1924, kiu diris: »La Asocio ne intencas ellabori aŭ propagandi iun novan lingvon. Rilate al diversaj sistemoj ĝia rolo konsistas simple en tio, ke ĝi servas kiel neŭtrala centro por la interŝanĝo de studoj kaj informoj.« (Angle: »*The Association has no intention of developing or promoting any new language. In regard to different systems, its function is merely to serve as a neutral clearinghouse for study*

and information.« — *Outline of Program*, p. 13.)

Kaj s-ino Morris kaj ŝia edzo venis el riĉaj familioj eminentaj en komercaj, financaj, industriaj kaj politikaj aferoj. Dum la elektobatalo de 1932 s-ro Morris estis Prezidanto de Komitato de Respublikanoj por la Elekto de Franklin D. Roosevelt (kandidato de la Demokrata Partio). Gajninte la elekton, Prezidanto Roosevelt rekomencis s-ron Morris per ambasadora posteno. S-ino Morris ludis gravan rolon en la Kristana Asocio de Junaj Virinoj (YWCA). Ŝi estis membro de la Administra Komitato de Barnard College, Virina Kolegio de Columbia-Universitato en New York. Ŝi estis doktorino *honoris causa* de la Universitato de Syracuse (Ŝtato New York).

S-ino Morris interesiĝis pri la problemoj de internacia lingvo post la unua mondmilito. Tiam D-ro Frederick Gardner Cottrell, fama kemiisto kaj inventisto, estis prezidanto de komitato pri internacia lingvo en la Internacia Konsilantaro por Sciencaj Esploroj (*International Research Council*). Li kolektis informojn pri Esperanto, sed ankaŭ ricevis materialon pri Ido kaj diversaj aliaj projektoj. Venis al li la ideo, ke iu grava kaj riĉa organizo devus propagandi la ideon de internacia lingvo en malpli amatora maniero ol la Esperantistoj kaj Idistoj kaj ke tia organizo eble povus realigi interkonsenton inter Esperantistoj, Idistoj kaj aliaj mondlingvanoj. S-ino Morris

akceptis la ideojn de D-ro Cottrell kaj kolektis subtenantojn inter siaj gekonatoj kaj geamikoj. En 1924 S-ino Morris kaj D-ro Cottrell fondis IALA. La financa subteno venis ĉefe de ili mem, sed ili ankaŭ havigis al IALA donacojn de diversaj individuoj kaj institucioj.

Dum multaj jaroj S-ino Morris estis tre favora al Esperanto. Ŝi fariĝis Dumviva Membro de Universala Esperanto-Asocio kaj monsubtenis la publikigon de *Bibliografio de Internacia Lingvo* de Petro Stojan (1929) kaj de *Originala Verkaro de L. L. Zamenhof* (1929). La unua el tiuj verkoj enhavas ŝian bildon, la dua dediĉon al ŝi de D-ro J. Dietterle. IALA mem publikigis raporton en Esperanto (samtempe ankaŭ en Idio) en 1927. Ĝi publikigis Esperanto - lernolibron en formo de »Kurso pri Ĝenerala Lingvostudado« (*General Language Course*) en 1928. IALA starigis »Kunlaboron« pri statistikaj kaj lernejoj projektoj kun la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

En 1930 S-ino Morris organizis en Ĝenevo Kunvenon por Lingva Esplorado (*Meeting of Linguistic Research*), en kiu partoprenis unuflanke eminentaj lingvistoj (Profesoroj Funke, Karcevski, Debrunner, Hermann ktp.), aliflanke kelkaj elstaraj Esperantistoj (Colinlinson, Stojan, Perrenoud) kaj Idiojstoj kaj la aŭtoroj de Occidental, Novial kaj Esperanto II. Post tiu kunveno IALA ofte pretendis esti neŭtrala renkontejo por anoj de di-

versaj mondlingvaj sistemoj. Fakte la asocio iom post iom fariĝis tute neneŭtrala fabrikejo por nova lingvoprojekto. S-ino Morris diris, ke IALA uzas »nepersonajn sciencajn metodojn«. Fakte tamen ŝia persona opinio decidis preskaŭ ĉion. La membroj de la pagita stabo de IALA konstante ŝanĝiĝis pro malkonsentoj. La nova lingvoprojekto nomita *Interlingua* aperis nur post la morto de S-ino Morris. Ŝi sendube estus konsiderinta la Vortaron kiel ĉefverkon de sia vivlaboro. Mi ne estas same certa pri la Gramatiko.

Alice Vanderbilt Morris havis multajn meritojn: Ŝi estigis intereson pri internacia lingvo kaj pri Esperanto en influhavaj rondoj, monsubtenis gravajn publikigaĵojn en kaj pri Esperanto, inteligente kontraŭbatalis la argumentojn de *Basic English*, akcentis la uzon de seriozaj sciencaj metodoj en la interlingvistika movado kaj en la propagando. Aliflanke ŝi ankaŭ kelkfoje malutilis la movadon por internacia lingvo, uzante sian personan kaj financon potencon por akceli metodojn dube sciencajn kaj disvastigante konfuzajn ideojn pri principoj kaj faktoj en la kampoj de la interlingvistiko. Tamen — kiel D-ro Alexander Gode, ĉefa aŭtoro de la Gramatiko kaj Vortaro de *Interlingua*, iam diris al mi — »profunde en la koro kaj en sia bazo sinteno ŝi ĉiam restis Esperantistino«.

WILLIAM SOLZBACHER. Ak.

Mi petas permeson iom suplementi la nekrologon verkitan de S-ro Solzbacher. Mi tre bone konis la geedzojn Morris dum multaj jaroj kaj vizitis ilin en la hejmo kaj en Usono kaj en Belgujo. En multaj kunsidoj mi persone kunlaboris kun S-ino Morris, kiu redaktis mian verkon pri »Indication«. En lingvaj diskutoj ŝi montris sin vere humilanima kaj neniam despotema. Pro ŝia neskuebla respekto al la metodoj de naturscienculoj ŝi emis serĉi la solvon de lingvaj problemoj per matematikaj kaj meĥanikaj procedoj kaj — miaopinie — kelkfoje fidis tro multe al la saĝ-

eco de komitatoj. Tamen ŝi bone komprenis mian fidelecon al Esperanto kaj neniam igis mian pozicion en IALA embarasa. La 'misevoluo' de IALA vere komenciĝis kiam S-ro Stillman — laborante sub la aŭspicioj de la Rockefeller Foundation — favoris la okcidentalan tipon. Mi dubas, ĉu S-ino Morris plene aprobis la eventualajn rezultojn. Sume, mi konservas memoron de aparte ĉarma kaj aminda virino. Mi tre ŝatas ŝian devizon: »ĉiuj vojoj fine kuniĝas sur la supro de la monto«. Ŝi ripozu en paco!

W. E. COLLINSON.

BIBLIOGRAFIO

Alice Vanderbilt Morris neniam verkis libron, kaj ankaŭ broŝuroj kaj artikoloj tute verkitaj de ŝi ne estas multnombraj. Tamen ŝia redakta kaj konsila kunlaboro estis tre grava por ĉiuj publikigaĵoj de IALA. Jen, unue, broŝuroj kaj artikoloj aperintaj sub ŝia nomo:

International Language and the IALA. — En la revuo »The American Scholar«, New York, Somero 1941.

Why Should We Cut Out Our Tongues? — En la revuo »The Forum«, New York, Majo 1927.

A Voice in the World. — En la revuo »Quest«, New York, 1936; represita en »Global Thinking«, Detroit, 1945.

Statement Prepared for the Second International Congress of Linguists, Genève, Aŭgusto 1931.

Raporto de la Honora Sekretariino de la Amerika Asocio por Internacia Helplingvo (IALA). En Esperanto. New York, 1927.

Raporto da la Honoral Sekretario di la Amerikan Asociuro por Internaciona Helpolingvo (IALA). En Ido. New York, 1927.

Alice Vanderbilt Morris estis »redaktorino« aŭ »eldonistino« de jenaj verkoj:

A Plan for Obtaining Agreement on an International Language. New York, 1924.

Annual Reports of IALA, New York, 1925—1941.

General Report of IALA, New York, 1945.

Edward Sapir, Totality, Baltimore, 1930. Publikigita de la Linguistic Society of America.

Edward Sapir kaj Morris Swadesh, *The Expression of the Ending-Point Relation in English, French and German*, Baltimore, 1932. Publikigita de la Linguistic Society of America.

William Edward Collinson, *Indication*, Baltimore, 1937. Publikigita de la Linguistic Society of America.

A Preliminary Investigation of the Teaching of Auxiliary Languages in Schools. — A report to the Council of the Parents League of New York. New York, 1927.

W. S.

G. J. Ramstedt

22. 10. 1873—25. 11. 1950

Funebra informo atingis nin en fino de novembro 1950: Profesoro G. J. Ramstedt mortis baldaŭ post sia 77-a naskodato.

Profesoro Ramstedt estis naskita kiel filo de maŝinlaboristo en la malgranda urbo Tammissaari ĉe la suda bordo de Finnlando. 19-jara li ekstudis en la universitato de Helsinko, kie li en tri jaroj finis la ekzamenojn por magistra grado en la filologia fako. La unua objekto de liaj lingvaj studoj estis la lingvoj de la finno-ugria familio. Por tiu celo li faris ekskurson tutsomere en 1898 al la ĉeremisoj, loĝantaj ĉe la meza fluo de Volga, nordokcidente de Kazan. La rezultoj aperis en 1902 kiel »Bergtscheremische Sprachstudien« (MSFO XVII¹). Pli malfrue aperis ankoraŭ artikoloj el la sama branĉo de filologio, en FUF kaj Neuphilologische Mitteilungen, kaj dum siaj prelegoj en la universitato Ramstedt ofte aludis al la lingvoj finna, hungara kaj aliaj finno-ugriaj lingvoj, ĝis la samojeda. Intertempe li tamen elektis kiel specialan

objekton de siaj esploroj la altajn lingvojn, kaj diligentis sur tiu kampo dum 51 jaroj. Jam en 1898 li veturis de la ĉeremisoj rekte en la koron de Mongolio, kie li en Urga kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj restadis pli ol du jarojn por studi la parolan lingvon de la mongoloj, kiu neniam antaŭe trovis la intereson de iu lingvisto, kvankam la rusoj jam antaŭ jardekoj aperigis vastajn vortarojn pri la literatura mongola lingvo de la ĝingis-kana tempo. Per ĉi tiuj laboroj li doktoriĝis, kun rimarkinda disertaĵo »Ueber die Konjugation des khalkhaa-mongolischen« 1902. De tiu baza verko ĝis la fino de sia vivo Ramstedt laboris preskaŭ ekskluzive sur la fundamento de siaj propraj materialoj, ĉar li elektis al si la sorton de sarkisto de netuŝitaj kampoj, studente la lingvojn turkan, tungusan, manĉuan kaj, post novaj studvojaĝoj, kalmukan, en Kaŭkazo nogajan kaj kumykan, en Afgano mogolan. La nova ekskurso daŭris tri jarojn, sed jam en 1905 aperis la unuaj rikoltoj en formo de studo »Mogholica«.

En 1906 Ramstedt estis nomata

¹) MSFO, ISFO, FUF: vidu Klarigojn en fino!

docento de la altaĵa lingvistiko en la universitato de Helsinko, sed por sia vivteno li devis plurajn jarojn labori kiel lica instruisto kaj poste kiel aganta sekretario de granda popolkleriga kaj kontraŭalkohola societo tutlanda. Nur en 1917 li estis nomata eksterordinara, persona profesoro de la universitato, de kiu posteno li pensiumiĝis en 1941. Sed dum sia docenta periodo li faris ankoraŭ du vojaĝojn al Mongolio (1909 kaj 1912), dum kiuj li trovis i. a. gravan, pli frue nekonitan praturkan monumenton kun longa teksto ŝtonhakita, kiun li publikigis kun germana traduko kaj detala komento (JSFO XXX) 1913.

Kalmukaj tekstoj aperis en 1909 kaj 1919, kaj fine en 1935 pretiĝis profunde prilaborita etimologia vortaro »Kalmückisches Wörterbuch«, kiun oni konsideras eble la plej firma monumento de la laboroj de Ramstedt.

Tutan jardekon, 1919—30 Ramstedt servis kiel registara sendito de Finnlando en Japanio kaj Ĉinio. Ĉi tiu tempo estis epokfaranta al la altaĵa lingvistiko, ĉar Ramstedt havis la okazon profundigi en la sekretojn de la korea lingvo, kaj ĉe tio li sukcesis definitive pruvi, ke la korea lingvo estas parenca al la mongola kaj turka, kaj sekve apartenas al la altaĵa lingvogrupo. Ĉi tiuj studoj maturiĝis kiel ampleksaj studverkoj post lia reveno en la hejmlandon: en 1939 »Korean Grammar« (MSFO LXXXII) estas la unua klara analizo de l' strukturo de tiu lingvo nemulte konata kaj dum 1500 jaroj forte in-

fluita de la ĉina lingvo. En 1949 aperis etimologia vortaro de korea lingvo »Studies in Korean Etymology« (MSFO XCV) kiel giganta sintezo de la laboroj de la verkinato, dum lia granda lingvista testamento, ĝenerala pritrakto de la fonetiko kaj morfologio altaĵa, ne aperis ĝis la morto de la sciencisto.

Karakterize estis al ĉiuj verkoj de Ramstedt malofta amplekso de konoj — profunda scio de kvar aŭ kvin lingvistikaj grupoj — genia kapablo de kombinado kaj forta krea fantazio. Dank' al tio liaj fundamentaj verkoj pri la altaĵa lingvistiko portas la stampon de klasikeco kaj daŭra valoro.

Ramstedt estis 19-jara studento, kiam li eklernis kaj ellernis esperanton. Jam tre frue li havis kontakton kun aliaj esperantistoj, i. a. rusoj travojaĝantaj Finnlandon, kaj trovis intereson al la poezio esperanta. Inter liaj postlasitaj manuskriptoj estas trovita kajero kun poemtradukoj de la jaro 1897, kiuj jam montras majstradon de nia lingvo. La lingvista intereso al esperanto ĉiam estis viva ĉe li, kion pravas i. a. la opinioj pri la preferindeco de esperanto antaŭ angla aŭ germana lingvo en lingvistika uzo, kiujn li kun emfazo disvolvis en interparolo kun d-ro Neergaard ĉe lia vizito en Helsinko, en junio 1950. Tamen liaj verkoj pri esperanto estas malmultaj — ni konas opiniesprimon en la germana kongresa libro »Esperanto ein Kulturfaktor« 1913. Kultura revuo »Valvoja« aperigas printempe en 1917 lian 7-paĝan studon »L. Zamenhof ja (= kaj) esperan-

to», kaj aŭtune saman jaron li kiel ĵus nomita profesoro komencas prelegserion pri »Enkonduko en la lingvosciencan, kun konsideroj pri esperanto.« En 1919 li eĉ instruis kurson de esperanto por studentoj, kaj en sama jaro li estis elektita — kun profesoroj Emil Setälä kaj A. Wallensköld — en ŝtatan komisionon por studi la dezirindecon de la instruado de esperanto en finnlandaj lernejoj, kaj la pozitiva raporto verŝajne estas esence verkita de Ramstedt, kiun E. Setälä subtenis, dum Wallensköld proponis idon. En Tokio aperis en 1950 »Letero de G. J. Ramstedt«, evidenta lingvistika studo pri japana lingvo. Dum la restado en Japanio, 1919—30, Ramstedt multe uzis esperanton praktike, por prelegoj pri Finnlando en diversaj urboj japanaj, sed el tiuj esperante verkitaj prelegoj nur unu — pri la socia vivo en Finnlando — estas trovita inter la postlasitaj dokumentoj. Pri siaj vojaĝoj kaj ekskursoj Ramstedt publikigis du verkojn popularajn,

»Seitsemän retkeä itään« (Sep ekskursoj al oriento) 1944 kaj »Lähettiläänä Nipponissa« (Kiel sendito en Nippono), kiu pretiĝis ĵus antaŭ lia morto. En la lasta li dediĉas tutajn ĉapitrojn al pritakto de la helpo, kiun li ricevis per esperantistoj en sia diplomatia tasko.

Sed kiel jam dirite, Ramstedt de la juneco havis profundan intereson al la poezio. Liaj esperantaj tradukoj de poezio, ĉefe de finnaj verkistoj, montras majstradon de la lingvo, kaj multaj el ili apartenas al la plej ŝatataj kantoj de finnaj esperantistoj.

Profesoro Ramstedt estis dum kelkaj jaroj prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj de Esperanto-Instituto de Finnlando, poste honora prezidanto. Ofte li ĉeestis esperantistajn kunvenojn kaj rakontis pri siaj spertoj en la fremdaj landoj. Li estis modelo de genia sciencisto, senpretenda kaj humila inter samideanoj, bonkora amiko kaj altmensa idealisto, kiun neniu forgesos, kiu havis la feliĉon konatiĝi kaj amikiĝi kun li.

BIBLIOGRAFIO

- JSFO = Journal de la Société Finno-ougrienne, Helsinki.
 MSFO = Mémoires de la Société Finno-ougrienne, Helsinki.
 FUF = Finnisch-ugrische Forschungen, lingvista revuo, Helsinki.
 Neuphilologische Mitteilungen, revuo de la societo por modernaj lingvoj en Helsinki.
- Poeziaj tradukoj de G. J. RAMSTEDT:
- J. L. Runeberg, La knabo de vilaĝo (Finna Esperantisto, 1914).
 - J. L. Runeberg, La venko de la noblo (Finna Esperantisto, 1914).
 - Eino Leino, Legendo, Esperanta Finnlando, 1920.
 - E. v. Qvanten, Kanto de Suomi (Kongresa libro, 5a kongr. de finnl. esperantistoj, 1919).
 - Z. Topelius, Marŝo de la finna kavalerio en la 30-jara milito (Kongresa libro, 1919).

- (Bj. Björnson) O. Vuorinen, Finna lando (Kongresa libro, 1919).
 Y. Koskinen, Inter pinegoj, (Kongresa libro, 1919).
 J. H. Erkko, La blua lago (Kongresa libro, 1919).
 A. B. Roos, Ho, Dio, estu via beno (Kongresa libro, 1919).
 Paavo Cajander, Himno al patrolando, Esperanta Finnlando 1920.
 J. L. Runeberg, Knabino de servutbieno, Esperanta Finnlando, 1920.
 — , Nia lando (8 str.) Esperanta Finnlando, 1921.
 V. A. Koskenniemi, Marŝo de mortintoj, Esperanta Finnlando 1921.
 J. H. Erkko, Kanto de Häme, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 P. J. Hannikainen, Kanto de Kareloj, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Eino Leino, Matena kanto, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Z. Topelius, Somertago en Kangasala, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 — , La lago Inari, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 N. Järvinen, Kien senĉese, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 J. J. Wecksell, Ne tre longe daŭras tago, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 E. Bøgh, La sonoriloj de la monaĥejo, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Z. Topelius, Marŝo sur Balkano, Sonu, kanto, sonu, 1945.

Popolkantoj finnaj:

- Popola kanto: Unu rozo kreskadis (Kongresa libro, 1919).
 Vento kurbigis la blankajn betulojn, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Knabaĉo malinda, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Vi kreskis bela junulin', Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Tien trans arbar', Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Mi ja intencis sola vivi, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Talapakan Nikolao, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Suno de somervespero, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 En boato sur la akvo, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Bonan bonvesperon, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Frue matene, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Elflugis ĝojo, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Kukolo kantas, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 Kiam mi la hejmon forlasis, Sonu, kanto, sonu, 1945.
 La folioj de verda tremolo, Sonu, kanto, sonu, 1945.

Originala poemo de G. J. RAMSTEDT:

- Al la esperantistoj en Osaka (Kelkaj vortoj en Kalevala-maniero)
 74 versoj, Verda Utopio, marto 1921, Osaka.

Scienca traktajo:

- Komentario de d-ro G. J. Ramstedt, al »Traktato pri la origino de japana popolo« de Motojuki Tokieda, 4 paĝoj en aldono al aŭ ekstrakto el La Revuo orienta, aŭgusto 1930, paĝoj 13—16. Ŝajnas, ke la artikolo estas represo el »Japan Advertiser« de 15-a de oktobro 1929.

(Eventualaj aliaj publikaĵoj en Japanio estas al ni nekonataj).

VILHO SETÄLÄ.

Leo Blaas

Da tempo al tempo iu min demandas, kial post la kvara parto de mia Enciklopedia Vortaro pluaj partoj ne aperis. Kaj ĉiam mi devus doni la saman respondon: Ĉar homoj kiel Leo Blaas estas maloftaĵo. T. e. viroj, kiuj kombinas profundan sciencan konon de Esperanto kaj aliaj lingvoj kun la abnegacio de vera esploristo kaj kiuj estas pretaj elekti en juna, fekunda aĝo la esperantologion kiel profesion.

Blaas estis unu el miaj du tuttagaj kun-redaktantoj por la kvara parto (1928) de la Enciklopedia Vortaro. Li mortis en 1951; la alia estis Alexander Schwarz, kiu laboris por mi de 1927 ĝis la fino de sia vivo en 1946. Sen tiaj unuarangaj profesiaj kunlaborantoj ne estas eble aktualigi kaj presigi la manuskripton restantan de la Enciklopedia Vortaro.

La legantoj de „Esperantologio“ konas Blaas kiel aŭtoron de monumenta „Statistiko de 50 000 Tekstvortoj“ („Esperantologio“ p. 107—132, 160—200). Krome multaj aliaj ellaboraĵoj de Blaas ekzistas. Manko de loko malpermesas ĉi tie listigi ilin. La plejparto ankoraŭ ne estas publikigita. Ne pro manko de meritoj, sed ĉar la modestan aŭtoron ĉiam tedis la serĉado de eldonontoj.

En 1948 fine realiĝis multjara espero de Blaas: Li estis nomata lektoro de Esperanto ĉe la Universitato de Innsbruck. Sed li ne instruis simple la elementojn de Esperanto: Centron de la interlingvistiko li volis krei. La lin-

gvisto prof. Amman, kiu faris nekrologon por Blaas en la nomo de la Universitato, substrekis la universalecon kaj kompetentecon de lia lingvistika laboro. Li menciis, ke jam en 1936 la filozofia fakultato estis proponinta BLAAS kiel lektoron de Esperanto.

Vivo privata kaj jurista. 1891: 14-an de januaro: Naskiĝo, en Innsbruck, Tirol (Aŭstrio). Filo de universitata profesoro en Innsbruck. *1912/16:* Studado en la Universitato de Innsbruck, fakultato de juroscienco. *1916:* Doktorigo. *1919:* Sukcesa trapaso tra la ekzameno por la ofico de juĝisto. *1922:* Edziĝo kun Rose Hübl. *1926:* Forlaso de la ofico de juĝisto, post oficado ĉe la tribunaloj en Innsbruck, Landeck kaj Rattenberg (ĉiuj en Tirol). *1951:* 29-an de novembro: Morto per kormalsano.

Aktiveco lingvofaka kaj folklor. *1907:* Esperantistiĝo. *1926:* Komenciĝo de lingvaj esploroj. *1928:* 1-an de januaro ĝis 30-a de septembro: Ĉefofica kunredaktisto de la Enciklopedia Vortaro de Wüster, en Berlino. *1929/30:* Lingvaj esploroj en Vieno. *1931—:* Daŭrigo de la lingvaj esploroj en Natters, proksime de Innsbruck. *1939/47:* Laboroj ĉe la Folklor Instituto de la Universitato en Innsbruck. *1948/51:* Lektoro de Esperanto ĉe la Universitato en Innsbruck. *1949:* Instalado kiel direktoro de la „ŝtata Komisiono por ekzamenoj por la ofico de instruisto de Esperanto ĉe publikaj sekundaraj lernejoj“.

EUGEN WÜSTER

REFERATOJ • RECENZOJ

En la lastaj jaroj aperis la ĉi-sube recenzitaj tri vortaroj, kiuj en diversaj manieroj suplementas unu al la aliaj. Sendube ili montriĝos utilaj i. a. por tiu daŭra analizado kaj sintezado de vortoj en Esperanto, kiu estas necesa por plua progresado de la vortotrezoro en tiu ĉi lingvo.

GODE, ALEXANDER: Interlingua-English, a dictionary of the international language prepared by the research staff of the International Auxiliary Language Association under the direction of Alexander Gode, Ph. D. Storm Publishers. New York 1951. 64 + 415 p. 8°. \$ 5.—.

Tiu ĉi ampleksa vortaro de internaciaj vortformoj estas la rezulto de multjara, sistema registrado kaj komparado de vortformoj en la ĉefaj latinidaj lingvoj (franca, itala, hispana, portugala) kaj la angla lingvo. La faritaj analizaj vortstudoj estas bazitaj sur la t. n. vortfamilioj tiel, kiel tiuj ĉi manifestiĝas en la menciitaj lingvoj. Ekz. oni komparis la vortfamilion *volvere* (latina) inkluzive de diversaj derivaĵoj, ekz. *evolvere*, *revolvere*, *involvere* ktp., kun la respondaj vortformoj en la aliaj fontlingvoj laŭ la jena skemo:

L	e	r	e	i	n	v	o	l	e	r	e
F											
I											
H											
P											
A											

Tiel procedante oni povis ekhavi klaran bildon pri la konkre-

taj formoj de la derivaĵoj en tiuj lingvoj. Oni povas imagi, ke tiu ĉi esplorado pri la ekstera formo de la vortoj estis grandega, ĝia efektivigo estas sufiĉe impona, sed ĝi postulis grandajn monsumojn. Tamen estas necese atentigi, ke tiu ĉi grandioza studado ne povis, kion akcentis antaŭ mi D-ro GODE dum mia vizito en 1947 en la estinta esplorinstituto de la nun malfondita I. A. L. A., inkludi la sisteman registradon de la derivaĵoj laŭ iliaj *signifoj*, ĉar tia registrado estus multe tro giganta. Aliflanke, tio ne signifas, ke oni ĉe la sintezado de la vortformoj neglektis la signifon de la unuopaj vortoj. Oni klopodis elekti la plej internaciajn signifojn de la unuopaj vortformoj, kaj el tio en tre multaj kazoj rezultis pluraj, diversaj signifoj de unu vortradiko, el kio ree sekvas multaj teoriaj semantikaĵoj ebloj ĉe derivado. Fine, por povi en ĝusta maniero elekti el la diversaj lingvoj la vortformojn uzindajn kiel bazon ĉe la sintez-

ado de la vortformoj en internacia planlingvo, estus — kiel ŝajnas evidente — necese priatenti ilian efektivan uzon en tiuj diversaj lingvoj. Vortformo povas ekzisti en lingvo, sed esti uzata nur tre malofte aŭ de malvasta rondo. Tia formo ne devas ludi la saman rolon ĉe la sinteza procedo kiel diferenca formo multe kaj vaste uzata. Tial, krom semantikaj studoj, ankaŭ statistikoj pri vortofteco nepre devas esti priatentataj por ke oni povu ekstrakti el la fontlingvoj kontentigan internacian normformon de vortradiko aŭ derivaĵo. Mi havas la impreson, ke oni tion ĉi tro neglektis. Tio evidentiĝas i. a. en la starigo de unu el la gvidprincipoj de la uzita procedmaniero: A word is eligible in the international vocabulary if it occurs . . . in the current or historical vocabulary of at least three of the source units, Italian, Spanish/Portuguese, French and English and also German and Russian. — Kiel oni vidas, ankaŭ historiaj formoj eluziĝintaj ŝajne estis ekceptataj kiel bazo ĉe elekto.

La vortaro enhavas abundan materialon, entute 27.000 vortformojn. Ĝi registras 124 aktivajn afiksojn, sed kelkaj el ili havas plurajn formojn, dependajn de la vortradiko derivota, ekz. por *kun* la jenaj: *co-*, *col-*, *com-*, *con-* kaj *cor-*. La sintezitaj vortformoj atingitaj estas ekstreme naturismaj formoj, kiuj, laŭ la klopodoj de la kompilintoj, celas redoni formojn kiel eble plej proksimajn al la naturaj formoj en la fontlingvoj. Por tion atingi oni devis kiel eble plej

malmulte modifi la nacilingvaj vortformojn, kaj pro tio oni ne klopodis dum la procedo ellabori ian reguligan gramatikon. Kontraŭe, la gramatiko (kun la komplikaj altruditaj de la fontlingvoj) de la tiamaniere konstruita planlingvo devas poste esti deduktata el la ricevita trezoro de la sintezitaj vortoj. Fakte aperis poste tia gramatiko de Interlingua, prezentata nur kiel *propono* de gramatiko, kiel unu el pluraj ebloj.

Tie ĉi mi ne diskutas la gvidajn principojn por la formado de racia planlingvo tiel, kiel ili respeguliĝas en la du tipoj de planlingvo, la skema, aŭtonoma (la tipo de Esperanto) kaj la naturisma, ne-aŭtonoma (la tipo de Interlingua). Sed estas necese akcenti, ke en Interlingua la vortderivado estas afero tute malsama al tiu en Esperanto, en kiu ĝi ja, propre, estas simpla vortkunmetado, ĉe kiu la elementoj de la vortkunmetaĵoj principe konservas sian originan signifon. En Interlingua nur la eksteraj vortformoj estas derivitaj, sed ne nepre la senca enhavo implicita en la elementoj de la derivaĵo. La vortradiko *vider* (kun ĝiaj formaj variaĵoj *vid-/vis-/vist-*) por *vidi*, donas kiel derivaĵojn ekz. *evident*, *visible*, *vision*, *visage*, *visiera*, *aviso*, *provider*, *revider*, el kiuj derivaĵoj multaj tute perdis la originan sencon de la derivita vortradiko. Same *curren* por *kuri* donas derivaĵojn, kiuj nur en sia ekstera formo, sed ne plu laŭ aktuala sencenhavo, estas derivita el ĝi: *currente*, *cursive*, *currero* ktp.

Sed la materialo tiel, kiel ĝi

estas prezentita en tiu ĉi libro, havas grandan valoron ankaŭ por esperantologo, kvankam lia labor-kampo estas lingvo konstruita laŭ malsamaj gvidprincipoj. La vortaro donas, kiel rezulton de sistema interpolado (kaj iufoje ekstrapolado) de nacilingvaj vortformoj, grandan nombron da proponataj internaciaj normformoj de vortoj, tre utiligindaj, eĉ se detalojn en la uzitaj deduktaj principoj oni povas diskuti, kaj eĉ se — tre bedaŭ-

rinde — forestas en la vortaro la nacilingvaj vortformoj, sur kiuj baziĝas la prezentitaj Interlinguavortformoj. La vortaro povas esti vere utila laborilo, kiam oni havas la taskon elekti la plej internacian vortformon de nocio, por kiu oni devas enkonduki novan vortradikon en Esperanton, kaj ĝi povas utili en niaj klopodoj por kiel eble plej simpligi la principojn por transskribado de internaciaj vortoj en Esperanton.

BASTIEN, LOUIS: Naŭlingva etimologia leksikono (dua, prilaborita eldono). The Esperanto Publishing Company Ltd., Anglujo 1950. 17 + 317 p. 12.5 × 8.5 cm. 12 ŝil. 6 p.

El unu vidpunkto tiu ĉi vortaro povas utili kiel valora suplemento al la du aliaj vortaroj ĉi tie rezenz-itaj: esence ĝi donas la *krudmaterialon*, el kiu estas kreita 1) la plimulto de la oficialaj vortformoj en Esperanto, 2) same granda nombro (kaj pli) da vortformoj en Interlingua. Komparante la Esperanto-formojn kun la sintezaj internaciaj formoj en la Interlinguavortaro oni samtempe havas la eblon kompari la principojn uzitajn por la sintezado kiel tiu ĉi estas praktikita en la konkretaj solvoj de Esperanto kaj Interlingua. Komparu ekz. jenajn diferencajn solvojn prezentitajn de Esperanto kaj Interlingua respektive, kun la nacilingvaj formoj troveblaj en la tabeloj de la leksikono: *diablo-dia-bolo*, *ekzisti—exister*, *imagi—imaginar*, *impresi—impresionar*, *lingvo—lingua*, *nombro/numero—numero*, *stelo—stella*, *suĉi—suger*,

trankvila—tranquille, *tranĉi—trancar*.

Mi tre bedaŭras, ke forestas en la leksikono la *gramatikaj vortoj*, nome afiksoj, pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj, adverboj. Krome estas, sed pli prave, ellasitaj diversaj kategorioj de vortoj derivitaj, por eviti ripetaĵojn. Pri la afiksoj oni devus procedi tute male ol farite, ĝuste ilin oni devus zorge pritrakti. Eĉ estus tre valore inkludi ankaŭ pseŭdoafiksojn, ekz. *-it* en ekz. *bronkito* kaj *jezuito*, *-izi* en ekz. *centralizi*, *-ik* en *retoriko*, *tragika*, *ktp*. Ĝuste la pritrakto de tiu grava vortkrea materialo en la internacia vortotrezoro povus esti grava helpo por la plua evoluo de nia lingvo montrante i. a. la transskribajn principojn uzitajn — kaj uzatajn. Same mi bedaŭras, ke la ceteraj t. n. gramatikaj vortoj forestas — oni povus ilin prezenti en apartaj tabeloj, por ke la ekstreme

skemecaj principoj, kiujn aplikis ZAMENHOF ĉe la kreado de iuj kategorioj de vortoj (ekz. la vico *mi-vi-li-ŝi* ktp.) ne perdiĝu en la alfabeto aranĝo de la cetera vortaro. Tre interesa estus tia aranĝo de ekz. la korelativoj, kiu sendube montrus ĉe komparo kun *ĉiuj* — ĉu parencaj, ĉu neparencaj — paralelaj formoj en kelkaj naciaj lingvoj, ke tiuj en la okuloj de la „naturalistoj“ tiel herezaj kaj ŝajne tiel artefaritaj („monstraj“) formoj estas pli naturaj, ol oni kredas ĉe la unua ekvido. Mi bonvensalutis suplementan volumon pritraktantan tiun ĉi gravan gramatikan parton de la esperanta vortotrezoro:

ro: la parton plej multe uzatan. Jen invito al kuraĝulo!

La vortaro enlistigas ĉ. 5.000 esperantaj vortradikoj kun paralelaj vortformoj en la lingvoj latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa (ĉi-lasto en transskribita, esperant-alfabeta formo) — kaj estas surprize malmultaj „truoj“ en la paralelistoj.

En la lingvistika aparataro de la esperantologo tiu ĉi vortaro estas grava helpilo, nemalhavebla en la studado kaj esplorado de la vortotrezoro de Esperanto en la lumo de ĝiaj fontolingvoj.

WARINGHIEN, G.: Plena vortaro de Esperanto. Suplemento. 63 p. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1954. 20.5 × 15 cm. 8.— anglaj ŝil.

En 1930 aperis la unua eldono de Plena Vortaro, kiu anstataŭis per sia triobla amplekso la vortaron de KABE, alte ŝatitan de la antaŭa generacio. Depost tiu ĉi epokfarinta transiro de „Kabe“ al P. V. la jena suplemento estas la plej grava dokumento pri la evoluo de nia vortotrezoro. Propre ĝi pli ĝuste estas suplemento al la 2-a, reviziita eldono de P. V., aperinta en 1934 (kaj poste fote reproduktita kiel 3-a eldono en 1947 kaj nun kun la suplemento kiel 4-a eldono). La suplemento estas la unua, espereble nur provizora rezulto de la diligenta kolektado kaj zorga, kritika kribrado el nia beletra kaj faka (precipe terminara) literaturo fare de nia gvidanta leksikografo. Efektive ĝi formas la kernon de

ampleksa manuskripto de Plena Ilustrita Vortaro, la frukto de plurjara vigla kunlaborado inter diversaj specialistoj kaj profesoro WARINGHIEN.

Plejparte la suplemento redonas vortradikojn uzatajn, ofte eĉ vaste uzatajn, sed ĝis nun ne registritajn en nia internacia normvortaro. Krome estas aldonitaj kelkaj novaj proponoj de vortradikoj. Fine la kajero enhavas plibonigojn aŭ kompletigojn al la artikoloj, la difinoj de la 2-a eldono de P. V.

Tre zorge estas registrita en la suplemento la grado de aŭtoritateco: en la enkonduko estas donitaj gravaj korektoj pri la oficialeco de la vortradikoj, ĉar kelkaj radikoj antaŭe estis neĝuste signitaj kiel oficialaj, dum aliaj estis neatenti-

taj. Kaj granda nombro da Zamenhofaj vortoj ĝis nun neindikitaj en P. V. estas troveblaj en la suplemento, ekz. *agresiva, hemikranio, hidropso, komplekso, kultivi, latino, latrino* (en la senco de publika necesejo!), *literatoro, maskerado, partizano, pigmento, pigra, polikliniko, potenciala, rapsodio, reformatoro, reportero, ruleto, sanskrito, savano, tombolo, uzurpatoro, zosterio*. Oni miras pri la plimulto el ili, ke ili ĝis nun mankis, kaj same, ke nur nun la jenaj (novaj) radikoj fine trovis sian lokon en P. V.: *galaksio, lispi, persieno, pŝogromo, pornografio, postiljono, preventi, proteino, protezo, pundo* (brita monunuo), *reflekso, refleksivo, reprezalio, skeĉo, sterila, ŝalti* — truoj feliĉe nun plenigitaj. Ankaŭ tre grava kaj bezonita kontribuo estas la modernaj vortradikoj de la scienco, tekniko kaj politiko, aperintaj en la lastaj jardekoj: *betatrono, ekzistadismo — ekzistencialismo, futurismo* (sed mankas *kubismo* kaj *surrealismo*), *helikoptero, hormono, impresionismo, koncentrejo, konvojo, masohismo* (mi preferas *masokismo*, formo, mi vetas, tamen venkonta), *nazio, nilono, penicilino, rasismo, sadismo, rotario, saboti, jeto, ofseto, radaro, rajono, skotero* kaj multaj aliaj, pri kiuj sendube ĉiuj konsentas. Estus estinta simpla peko neglekti tiajn gravajn, de ĉiuj uzatajn internaciaĵojn. Sed aliflanke, kaj tre laŭdirinde, la suplemento enhavas multajn esprimojn el la familiara kaj el la poezia lingvoj, esprimojn, kiuj laŭnature estas malpli internaciaj aŭ tute ne

internaciaj en sia formo, sed ofte jes kiel nocioj laŭ sia sencenhavo. Tiuj esprimoj povas manki en primitiva lingvo, en kiu oni povas ĉirkaŭskribi ilin aŭ redoni la koncernajn nociojn per aliaj neprecizaj surogatoj, sed la bezono por ili altrudiĝas ĉe pli delikata nuanciĝo en la literatura lingvo. Ankaŭ certaj psikologiaj kriterioj ne estu neglektataj ĉe akcepto de vortradikoj. Mi precipe volas defendi la vortradikojn proponitajn, eĉ jam vaste uzatajn en la beletro, por la t. n. „mal“-vortoj el la tipo de la zamenhofa *pigra* por maldiligenta, ekz. la jenaj, indikitaj en la suplemento: *frida, kurta, lanta, leĝera, magra, morna, olda*. Tiaj kaj multaj aliaj radikoj prezentitaj estu provataj en la praktiko, kiu finfine decidus pri akcepto aŭ neakcepto por la ĉiutaga lingvo. Ĉiukaze, estas rezulto de tute natura evoluo, ke Esperanto, same kiel aliaj lingvoj, nun ankaŭ ekhavas, estu ĝi interne de ne tro vastaj limoj, sian poezian lingvon (oni eĉ povas allasi — laŭ nacilingvaj tradicioj — ekz. *primavero*, kiu cetere — por kvietigo de aliopiniantoj — estas indikita nek en P. V. nek en la suplemento, apud la precize samsenca *printempo*).

La vortaro enhavas multajn *vortkunmetaĵojn*, kies internacia uzo fiksiĝis aŭ tre bezonas fiksiĝon kaj tial nepre devas ĉeesti, ekz.: *belarto, belgrajno, globkraĵono, ladaĵo, ladbovaĵo, ladmanĝo* ktp., *litkovrilo, litotuko, terlango, termezuri* (z), *tertremo* (z), *sonfilmo, sonprenilo, sonserpento* (kunmetaĵo aparte indikita en

Universala Vortaro!), *supersona*, *sonizoli*, ktp.

Kelkaj afiksoj, plejparte sciencaj-teknikaj, estas indikitaj, inter kiuj *-oz* por malsano (la malnova signifo de *-oz*, adjektiva, en la teknika senco de „plena“ ŝajne malsukcesis en la praktiko, kion mi ne bedaŭras) kaj *-esk*, poezilingva sufikso por „simila“.

Al la espereble fruktodona diskutado, kiun nepre naskas (devas naski) tiu ĉi vortaro de „neologismoj“ mi volas ankoraŭ aldoni jenajn rimarkojn: por *depresio* mi sentas la mankon de la medicina senco de tiu vorto. Ĉe *gazono* mi ŝatus aludon al la samsenca, sed laŭ mi malpli lerta formo *razeno*, kiun ĝi anstataŭas (*razeno* troviĝas jam en P. V., sed *gazono* pli frue troviĝis jam en la enciklopedia vortaro esp.-germana de WÜSTER). Por *ĝenro* mi volus aldoni duan signifon por literaturo: literaturspeco. La radiko *ĵaso* estas proponita anstataŭ *ĵasbando*, sed mi tre preferus reteni la laŭprononcan formon *ĵazo* aŭ *ĵaso*, same kiel mi preferus *ĝipo* anstataŭ proponita *ĵipo*. Por la nocio de *eksplícite*, LAPENNA proponis *eksprese*, tamen neanalogia al *implicite*. Mi sentas la mankon de vortoj tre ofte uzataj en Esperanto, kvankam sendube pli en tiu lingvo ol en aliaj: *oomoto*, *bahaismo*, kaj inter kunmetaĵoj *akceptejo*, *kongresejo* — por ne mencii la varman kaŝon, ĉirkaŭ kiu daŭre — kiel la kato — iradas nia P. V.: la kompatindaj geografiaj nomoj. Kaj krome: apud

(zamenhofaj) *latino* kaj *sanskrito* akceptitaj en la vortaro mi bonvenigus multe uzatajn terminojn por diversaj gravaj lingvogrupoj: *germana*, *latinida*, *finno-ugria*, *hindoeŭropa*, *slava* k. a. Mi ĝojas pro enmeto de *adasismo* (indikita kiel radiko!), sed ne sentas la bezonon de *mitingo*, kaj mi preferas *grapolo* antaŭ *traŭbo* pro semantika kaŭzo (germana *Trauben* fariĝis pli „vinberoj“ ol „vinberaro“, spite al la etimologio). Apud oficialaj *maksimumo* kaj *minimumo* estas bezonata *optimumo* (*optimismo*, *-isto* estas oficialaj).

Kiel jam aludite, la suplemento estas eldonita kune kun la malnova P. V. kiel ties 4-a eldono, nome en formo fote reproduktita kaj reduktita ĝis la formato 14 × 10 cm, kaj presita sur tre maldika papero (prezo: 22,00 anglaj ŝil.). Tiu ĉi poŝeldono estas tre praktika, la teksto estas al la plimulto klare legebla, kvankam oni reduktis, certe ĝis la ekstrema limo de la legokapablo, la formaton (multaj plendas, ke necesas lupeo).

P. V. en sia nova, modernigita adaptiĝo interna kaj ekstera, faros sian gravan servon al la plua unuecigo kaj plifajnigo de nia lingvo. Neniu serioza praktikanto de Esperanto povas ĝin malhavi. Ke ĝi ankaŭ stimulu la intereson por ĝia atendanta postsekvento: ke oni baldaŭ trovu rimedojn por forigi la praktikajn barojn, kiuj ankoraŭ malhelpas la aperigon de la alsuspirata Plena Ilustrita Vortaro.

PAUL NEERGAARD.

NOTOJ

Universitataj katedroj de Esperanto III ¹⁾

Aŭstrujo

Universitato Innsbruck (Universität Innsbruck). Post la morto de d-ro LEO BLAAS en novembro 1951 enoficiĝis kiel lektoro de E. kand. fil. HERMANN OELBERG. (Laŭ La Praktiko, n-ro 3 (173), p. 29, 1952).

Britujo

Universitato de Liverpool (University of Liverpool). *Nova lektoro*: post la emeritiĝo de profesoro W. E. COLLINSON ĉe la universitato li eksiĝis kiel lektoro de E. Transprenis la oficon d-ro F. I. WIENER, doktoro de filozofio el Universitato de Breslau, magistro el Universitato de Manchester kaj de kelkaj jaroj prelegisto en la germana fako de la Universitato de Liverpool.

Ĉeĥoslovakujo

Slovaka Komerca Altlernejo (Slovenská vysoká škola obchodná) en Bratislava. *Fondo de la katedro*: per decido de la profesorado, aprobita de Komisiitejo por instruado kaj klerigo en 1946. *Programo*: Kursoj por komencantoj, por progresintoj, ekzercoj en literatura kaj komerca lingvaĵoj, po du horoj semajne. *Rajtigo*: la studintoj rajtas peti pri ekzameno kaj la lektoro donas al ili ateston sub-

skribitan de li kaj la dekanato de la fakultato. *Lektoro*: PAVOL ROSA, vicdirektoro de la Nacia Asekuro por Slovakujo. *Aldona informo*: ne ĉiujare funkcias ĉiuj tri kursoj, sed la nombro de studentoj iufoje superas tiun de la kursoj de lektoratoj rumana, itala, hispana, franca.

Germanujo

Universitato de Hamburgo (Universität Hamburg). *Fondo de la katedro*: laŭ decido de la „Hamburger Schulbehörde, Hochschulabteilung“, U 134.14 de 6. 2. 1950 en la nomo de la Akademia Senato de la universitato. *Fakultata aparteno*: ekster la fakultetoj (rekte sub la rektoro). *Programo*: dufoje du horojn semajne por komencantoj kaj unufoje du horojn semajne por progresintoj. *Rajtigo*: aranĝo de ekzameno, kontrolata de komisiono konsistanta el la filozofia dekanato, la rektoro aŭ ties dekanato kaj la lektoro. *Lektoro* (Lehrbeauftragter): d-ro J. WEBER.

Jugoslavio

Universitato en Zagreb (Sveučilište u Zagrebu). *Fondo de la katedro*: per decido de la konsilantaro de la Ekonomia Fakultato de 2. 10. 1954. *Fakultata aparteno*: Ekonomia Fakultato. *Programo*: du-semestra elementa kurso. La prelegoj okazas unufoje semajne dum du horoj. *Rajtigo*: E. estas instruata kiel nedeviga fako, sed kiu ĝin

¹⁾ Universitataj katedroj de Esperanto I: Esperantologio I: 77—80; II: Esperantologio I: 142.

elektas, tiu devas ĝin enskribi en la „Index“ kaj absolvi ekzamenon. La ekzamenoj okazas post la prelegoj en la somera semestro, t. e. en junio. *Lektoro* (honorarni nastavnik, t. e. honoraria instruanto): d-ro Ivo BOROVECKI. *Aldonaj informoj*: 1) Laŭ la dekreto la lektoro estas elektita por 1954/55, kaj nova decido pri la lektorato por la venonta jaro estas farota. 2) En la periodo 1927—1940 d-ro DUŠAN MARUZZI estis honoraria docento pri E. en la EKVŠ (Ekonomsko-komerca Altlernejo), kiu post la milito fariĝas Ekonomia Fakultato de la Universitato.

Koreujo

Chunggu Universitato (Chunggu University).

Taegu Universitato (Taegu University).

Pri enkonduko de E. kiel deviga fako en tiuj ĉi universitatoj skribas profesoro ĉe Chunggu Universitato HENG WI HONG la jenon (laŭ Esperanto n-ro 558 (5), p. 133, 1952):

„De Aprilo 1951 mi rekomencis instrui E. kiel devigan lecionon ĉe Chunggu Universitato kaj ĉe Taegu Universitato, kiuj ĝis tiam estis devigitaj ĉesigi lecionojn pro la milito. En la rekomenco la nombro de la studentoj, kiuj lernis E. ĉe la du universitatoj estis ĉ. 200; nun ili nombras 260.“

Nederlando

Komunuma Universitato, Amsterdam (Gemeentelijke Universiteit Amsterdam). *Fondo de la katedro*:

decido de la urbestro kaj skabenoj de Amsterdam de 27. 11. 1953. *Fakultata aparteno*: Fakultato de Literaturo kaj Filozofio. *Programo*: 3 prelegoj ĉiusemajne dum la tuta daŭro de la akademia jaro. Por la kuranta jaro 1954—55: 1) kurso por komencantoj, 2) daŭriga kurso, 3) prelegaro pri la originala Esperanto literaturo. *Rajtigo*: la kursoj estas destinitaj por studentoj el ĉiuj fakultatoj; ekzamenoj ne okazas. *Lektoro* (houder van een leeropdracht, t. e. komisiita lekciisto): magistro SIGISMUNDO PRAGANO. *Aldona informo*: depost septembro 1950 mag. PRAGANO estis jam ligita al tiu ĉi fakultato kiel asistanto por E.

Aldono. Universitataj E.-kursoj ekster la katedroj

Informoj estas ricevataj pri instruado ekster la katedroj en la jenaj: *Universitato de La Laguna*, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, sub gvido de docento J. RÉGULO PÉREZ (laŭ Heroldo de E., n-ro 1163, 1952). *Universitato de Bologna*, Italujo, laŭ permesiga cirkulero de la Ministro de Publika Instruado kaj kun aprobo de la Rektoro kaj post deklaracio favora al E. voĉdonita de la Akademia Senato de la Universitato, kursgvidanto: d-ro O. NANNI (laŭ Esperanto, n-ro 570: 150, 1953). En *Pontifika Katolika Universitato de Porto Alegre*, Brazilo, gvidas kurson, organizitan de la Centra Gvidkomitato de la universitataj studentoj, s-ro Ivo SANGUINETTI (laŭ Esperanto, n-ro 571: 179, 1953).

Komuniko al la abonantoj

Post paŭzo en la eldonado finfine la unua volumo de Esperantologio povis esti kompletigata.

La revuo trovis tre favoran akcepton ĉe la publiko. La ekonomio de Esperantologio ne estas tiel malbona, kiel oni povus supozi pro la prokrasto de la kvara kajero. Tamen la preskostoj post la korea milito grave plialtiĝis, kaj sekve la buĝeto por la *dua* volumo tiel endanĝeriĝis, ke ankoraŭ la risko por komenci eldonadon de *dua* volumo ŝajnas tro granda sur la ekzistanta bazo. Krome, bedaŭrinde devas esti konsiderataj kiel perditaj, almenaŭ plejparte, kelkaj landoj, kiuj liveris konsiderindan parton de la abonantoj por la jena volumo. Tiu perdo okazis parte pro politikaj disponoj (orienta Eŭropo), parte pro malplivalorigo de valuto (ekz. Brazilo).

Ebloj por sekurigi pluan samnivelan eldonadon de tiu ĉi revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto estas atente serĉataj kaj proponoj tiurilataj dezirataj. Dume la abonantoj provizore bonvolu *ne* sendi pagon por (la ankoraŭ esperebla) dua volumo. Sed stoko de la aperinta volumo ankoraŭ ekzistas, kaj mendoj estas akceptataj.

PAUL NEERGAARD.

Communication to the subscribers

After an interruption in the publishing activity the first volume of Esperantologio has finally been completed.

In spite of this interruption the economy as a whole has been satisfactory. However, the printing costs rose considerably after the Korean war, and for this and some other reasons the economic conditions for publishing of a *second* volume seem too uncertain for the time being.

Nevertheless, we are looking for new possibilities in order to be able to continue the publication of Esperantologio. Meanwhile, the subscribers are requested *not* to send any payment for the second volume before information about the continuation is given.

Copies of the first volume are still available.

PAUL NEERGAARD.

INDEKSO

de temoj kaj aŭtoroj

Neindikataj estas resumoj, la Bibliografio de esperantologia literaturo kaj aŭtoroj de tekstoj analizitaj (vidu ekz. p. 111—114).

-a	82, 206	-e	82, 206
-ad-	84	-ec	85, 206
afiksoj en Esp-o	81—87, 205	-eg-	57
-aj-	206	EINSTEIN	213
akuzativo en Esp-o	33—52	-ej-	85, 206
AMMAN	244	ek-	83
ALBON	215, 227	eks-	83
-an-	206	eldorado	60—62
-ar-	84	ELDRIDGE	18, 19, 21, 22
AUERBACH	210	esperantologio, kiel termino	137, 209—214
AYMONIER	51, 235—236	esprimkapablo, funkcio de la vorttrezo-ro 5	
BALLY	33, 51, 235	-et-	86
BASTIEN	247	etimologio de Esp-o	247
BEAN	152	FARKAS	79
BEAUFONT, DE	42	FUGUIREDO, CANDIDO DE	71
BIANCHINI	87, 88	FLATTERS	78
Bibliografio de esp-ologia literaturo 73		FULCHER	106
—76, 133—136, 228—234		FUNKE	238
BLAAS	77, 106, 244, 251	GEISSLER	77
BLEIER	88, 204	GILBERT	215, 227
BLONDEL	48	gloso, difino de	9
bo-	83	GODE	213, 226, 227, 238, 245
BODMER	213	GÖRLICH	77
BOROVECKSI	252	GRÄBER	227
BOURLET	207, 235, 236	GROSJEAN-MAUPIN 71, 106, 151, 235, 236	
BRANDL	209	gverilo	66
BUCHANAN	77	ĝemelaj radikoj	98—106
CART	235	HAINSCHEGG	142
COLLINDER	49, 51	hebrea lingvo, objekt-morfemo	34
COLLINSON 46, 51, 78, 81, 205, 206, 238, 239, 240, 251		HENG WI HONG	252
COUTURAT	36, 46, 49, 52	HENMON	27
DANNEIL	8, 31	HERMANN	238
DAZAI	142	HEPBURN	89
DEBRUNNER	209, 238	Hispanidaj neologismoj en Esp-o ..	59
deficito de kompreno en Esp-o	15	HODAKOWSKY	79
deficito de kompreno en vortstatistiko 10		HOGBEN	210, 213
DELIAN	215, 227	h, ofteco de	6
DIETTERLE	207, 238	-i	83
dis-	83	Ido	42, 46, 49, 235
donhikoto	63—66		
donhuano	62—63		
DREZEN	53, 58, 80		

- ig- 86
 -il- 86, 206
 -in- 86, 206
 INGLADA ORS 65
 Interlingua 39, 210, 226, 245
 Interlingue (vidu ankaŭ Occidental) 210, 215
 interlingvistiko, kiel termino 137, 209—214
 JANOTTA 227
 japana lingvo, objekt-morfemo 34
 japanaj vortoj, esperantigo de... 89—97
 JENSEN 7, 8, 32
 JESPERSEN .. 46, 49, 208, 210, 212, 214
 JOS 71
 JOSSINET 53, 58
 KAEDING 5, 24, 27, 32
 KALOC SAY 71, 151, 211, 214
 KANDLER 214
 KARCEVSKI 238
 Katedroj de Esp-o, vidu Universitataj katedroj
 kaŭdilo 67—68
 KAWASAKI 89, 142
 kliŝo, difino de..... 10
 Komunikado al la abonantoj 253
 KÖKENI 88, 204
 KÖRTING 106
 KRUIT 205
 kvazaŭ-afiksoj en Esp-o (vidu ankaŭ ŝajnprefiksoj kaj pseŭdoafiksoj) 215—227
 Landnomoj en Esp-o 80
 LAPENNA 250
 Latino sine Flexione 39, 46
 LEAU 46, 52
 LONG 106
 LOTT 46
 MAIMIEUX, DE 80
 mal- 83
 MANDERS .. 46, 52, 137, 207, 210, 211, 212, 214, 215, 227
 MARBLE 53
 MARUZZI 252
 MAUTHNER 201, 204
 MENÉNDEZ 71
 MEILLET 209
 MESSING 209
 mis- 83
 MIYAZAKI 91
 morfemo 33
 MORRIS 237—240
 Mundolingue 46
 MURRAY 106
 MYLÉN 143
 NANNI 252
 NAVARRO TOMAS 71
 NEERGAARD 2, 4, 8, 16, 32, 59, 63, 71, 72, 77, 133, 143, 206, 209, 214, 216, 227, 228, 241, 250, 253
 -o 82, 206
 objekt-morfemo, hebrea lingvo 34
 objekt-morfemo, japana lingvo 34
 objekt-morfemo, okcident-europaj lingvoj 34
 Occidental (vidu ankaŭ Interlingue) 39, 46
 OELBERG 251
 OKAMOTO 91, 95, 96, 97
 -op- 206
 OSTWALD 48
 paradigmo, difino de 9
 PEANO 46, 210, 214
 PERRENOUD 238
 PETROCCHI 71
 PIGAL 43, 52, 227
 PITLIK 78
 planlingvo, kiel termino 210
 planlingvo naturisma, neaŭtonoma.. 246
 planlingvo skema, aŭtonoma 246
 planlingvistiko, kiel termino 138
 Plena vortaro 248
 Pra-Esperanto 47
 PRAGANO 252
 PRIVAT 81, 88
 PROROK 227
 provizo de kliŝoj, en vortstatistikoj 10
 pseŭdoafiksoj en Esp-o 247
 pseŭdoprefiksoj en Esp-o 145
 publikigaĵoj ricevitaj..... 143—144
 radikoido 12
 RAMSTEDT, A. 227
 RAMSTEDT, A. Z. 45
 RAMSTEDT, G. J. 240—243
 re- 83
 RÉGULO PÉREZ 59, 72, 205, 252
 REIERSØL 53
 ritmoj de Esp-o 152—159
 ROLLET DE L'ISLE 96, 97
 ROSA 251
 RUBLEV 8, 32
 SANGUINETTI 252
 SAPIR 240
 SAUSSURE, DE 207

- SCHAMANEK 77
 SCHLEYER 212
 SCHMIDT 209
 SCHWARZ 244
 SELDAM, TEN 215
 SETÄLÄ, EMIL 242
 SETÄLÄ, VILHO 5, 107, 201, 343
 SIRK 77
 SOLZBACHER 238
 STANCLIFF 8, 32
 STECHE 209
 STOJAN 72
 STRECKER 79
 statistika analizo de Esp-o 17, 26
 statistika analizo de angla lingvo 18—
 19, 21—22, 26, 27
 statistika analizo de franca lingvo 24, 27
 statistika analizo de germana lingvo
 26, 27
 statistika analizo de latina lingvo 24, 27
 statistika analizo de Peipinga dialekto
 23, 27
 statistikaj studoj pri la lingvo 5
 statistiko de vortofteco en Esp-o 107—
 132, 160—200
 STOJAN 238
 SWADESH 240
 SYGNARSKI 79
 ŝajnprefiksoj (vidu ankaŭ kvazaŭafik-
 soj kaj pseŭdoafiksoj) 145—151

 TEMERSON 79
 THORNDIKE 53, 56, 58
 toreadoro 68—70
 transskribo de japanaj vortoj en Esp-on
 89—97
 TROMPETER 47

 -uj- 86
 -ul- 87
 Universitataj Esp-o-kursoj.. 79—80, 252
 Universitataj katedroj de Esp-o
 Amsterdam (Komunuma Universitato)
 252
 Bratislava (Slovaka Komerca Altler-
 nejo) 251
 Chunggu (Univ.) 252
 Giessen (Justus-Liebig-Altlernejo) 79
 Graz (Teknika Altlernejo) 142
 Graz (Univ.) 142
 Hamburg (Univ.) 251
 Innsbruck (Univ.) 77, 251
 Kobe (Fremdlingva Kolegio) 142
 Kraków (Jagiellona Univ.) 79
 Liverpool (Univ.) 77, 251
 Lodz (Univ.) 79
 Mainz a. Rh. (Johannes-Gutenberg
 Univ.) 78
 München (Ludoviko-Maksimiliano-
 Univ.) 78
 (Teknika Altlernejo) 78
 Osaka (Fremdlingva Kolegio) 142
 Otani (Univ.) 142
 Praha (Ĉeĥa Teknika Altlernejo) .. 78
 Szeged (Univ.) 79, 142
 Taegu (Univ.) 252
 Wien (Altlernejo por Agrikulturo) 77
 (Altlernejo por Internacia Komer-
 co) 77
 (Teknika Altlernejo) 77
 Zagreb (Univ.) 251

 VEER, DE 216, 227
 VENDRYES 52
 VERDANO 59, 72
 vinjeto sur la kovrilo 80
 Volapük 46
 volvere, vortfamilio de 245
 vortderivado en Interlingua 246
 vortfamilioj 245
 vortformado en Esp-o kaj en angla ling-
 vo 53—58
 vorto, difino de, kiel termino 9
 vortofteco »okaza« 13
 vortofteco statistikoj pri 5

 WAHL, VON (DE) 36, 39, 42, 48, 50,
 216, 221, 227
 WAJSBLUM 205
 WALLENSKÖLD 242
 WARDEN 106, 151
 WARINGHIEN 33, 40, 47, 52, 71, 151, 205,
 207, 208, 210, 212, 214, 235, 236, 248
 WEBER 251
 WEISGERBER 209
 WIENER 85, 98, 145, 216, 227, 251
 WOLLMANN 77
 WÜSTER 63, 64, 66, 71, 91, 97, 209, 214,
 244

 ZAMENHOF 5, 47, 49, 50, 52, 81, 84, 87,
 98, 204, 205, 206, 207, 208, 212, 235, 236,
 248
 ZAMENHOFA Hamlet-traduko .. 201—204
 ZIEGLER 78, 79
 ZIPF.... 5, 6, 8, 9, 18, 20, 21, 24, 27, 32

La unua volumo kompleta de
ESPERANTOLOGIO

estas mendebla.

Pluraj publikaj bibliotekoj ĝin havas. Proponu la aĉeton de la volumo al publikaj bibliotekoj havantaj lingvistikan (evt. Esperantan) fakon, al lokaj Esperanto-bibliotekoj kaj al ĉiuj seriozaj studentoj de Esperanto.

Oni sin turnu al D-ro Paul Neergaard,
Gothersgade 158, Kopenhago K.